



EL POPOLA ĈINIO

Vortoj de Prezidanto Maŭ

En nia lando estas 700 milionoj da loĝantoj, kaj la laborista klaso estas la gvidanta klaso. Estas necese plene disvolvi la gvidan rolon de la laborista klaso en la granda kultura revolucio kaj ĉiuj laboroj. Samtempe la laborista klaso devas ankaŭ senĉese altigisian politikan konscion en batalo.

Prezio Revolu

En la 5-a de aŭg Taĉmento de la Penso tiu ĉi eksterordinare dojn por esprimi al la la tuta lando bolis er lionoj da loĝantoj, kaj en la granda kultura en batalo.” En tiu kamaradoj denove do Popola Liberiga Arm aplaudis al la ĉeestan zorgo, plej granda k lando.

La reprezentante dienco ĝojkriis kun s do de la proletara k paŝojn kaj la agadojn truadon, disvolvi so kune kun la popolo



La revoluciaj batalantoj de la Ĉefurba Laborista-Kampana Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong gaje kolektiĝas ĉirkaŭ la mangoj — la trezora donaco sendita de Prezidanto Maŭ, kaj deziras al Prezidanto Maŭ longan vivon!

Prezidanto Maŭ plej fidas la laboristan klason kaj la laborista klaso plej aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ. La tuta aŭdiencia halo bolas de ĝojo.



danto Maŭ Ligiĝas kun la ciaj Amasoj Koro kun Koro

usto, nia granda instruanto Prezidanto Maŭ transdonacis al la Ĉefurba Laborista-Kampana Propaganda
o de Maŭ Zedong la mangojn, trezoran donacon kiun li ricevis de fremdlandaj amikoj. Kiam disvastiĝis
ĝojiga novaĵo, oni varme ĝojkriis, fervore kantis kaj tuj okazigis en la nokto diversajn celebrajn aktiva-
granda gvidanto Prezidanto Maŭ sian koran fidelecon. Ĝuste je la 15-a de aŭgusto, en la momento kiam
jubilado, estis publikigita la ekstreme grava instrukcio de Prezidanto Maŭ: “En nia lando estas 700 mi-
la laborista klaso estas la gvidanta klaso. Estas necese plene disvolvi la gvidan rolon de la laborista klaso
revolucio kaj ĉiuj laboroj. Samtempe la laborista klaso devas ankaŭ senĉese altigi sian politikan konscion
ĉi tago Prezidanto Maŭ kune kun lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj aliaj centraj gvidantaj
nis aŭdiencon al la reprezentantoj de la ĉefurba laboristaro kaj la komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina
Armeo. Kun plene ridanta vizaĝo kaj brile radiantia mieno, Prezidanto Maŭ intime kaj varme mansignis kaj
staro kaj manpremis unu post alia kun la laboristaj reprezentantoj sur la podio. Tio estas la plej granda
konfido, plej granda eduko kaj plej granda subteno al la laborista klaso, la armeo kaj la popolo de la tuta

oj de la ĉefurba laboristaro kaj la komandantoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo akceptitaj en la aŭ-
enkompara emocio: “Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!” Ili decidis, sub la ordona-
komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel estro kaj Vicprezidanto Lin kiel vicedstro, unuigi la volon, kunordigi la
ojn, “**teni revolucion, stimuli produkton, akceli laboron kaj sinpreparon al milito**”, intensigi socialisman kons-
cialisman produktadon kaj batalakiri plenampleksan venkon de la granda proletara kultura revolucio
de la tuta lando.



Enketa Raporto pri la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko

VEN HIN.

Kun ĝojo ni rekomendas al niaj legantoj enketan raporton pri la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko. La raporto vivece priskribas la grandan ŝanĝon, kaŭzitan de la granda proletara kultura revolucio en unu flanko, nome en la vicaro de la inĝenier-teknikaj laborantoj, kaj montras la potencon vivforton de socialisma nova afero kaj samtempe ankaŭ la direkton de la eduka revolucio en lernejoj.

Prezidanto Maŭ montris penetrive: “Ankoraŭ necesas havi altlernejojn — ĉi tie mi parolas ĉefe pri altlernejoj de sciencoj kaj inĝenierado. Tamen la lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado, proletara politiko devas esti metata en komandon kaj la vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de teknikaj laborantoj el la laboristoj devas esti prenata. Studentoj devas esti selektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkjara studo en lernejo.”

La granda alvoko de Prezidanto Maŭ estas batala programo por konduki la proletaran edukan revolucion de nia lando ĝis la fino. Ĝi estas centjara politiko por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon.

Bonvolu legi la raporton; ĝi helpos vin kompreni, kial ni kondukas la proletaran edukan revolucion en Ĉinio kaj kian profundan signifon ĝi havas por la malproksima estonto.

— La Red.

PROFUNDA ŜANĜO ALPORTITA DE LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

La Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko estas granda fabriko, fama en nia lando pro sia produktado de precizaj frot-ilmaŝinoj. La vicaro de ĝiaj inĝenier-teknikaj laborantoj devenis de tri fontoj: 45 procentoj el laboristoj, 50 procentoj el diplomitoj de la altaj lernejoj en la jaroj post la Liberiĝo kaj la ceteraj procentoj el malnovaj teknikistoj postlasitaj de la malnova socio. La ŝtormo de la granda proletara kultura revolucio alportis profundan ŝanĝon en la vicaro de la teknikaj laborantoj en la fabriko.

La granda revolucia ŝanĝo ĉefe manifestiĝas en jenaj punktoj:

Unue, la proletaraj revoluciuloj estas vere en potenco en la fabriko, inkluzive tiun en teknikaj aferoj. La reakciaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatoj", kiuj antaŭe tenis la gvidantecon en tiuj aferoj, estas faligitaj. Teknikistoj de laborista origino, revoluciaj junaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj nun fariĝis mastroj de scienca esplorado kaj teknika projektado. Ili estas proletaraj revoluciuloj kun profunda klasa sentimento al Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. Tiu revolucia teknika laborantaro antaŭe subpremita nun senĉese manifestas sian saĝon en kreado kaj talenton en tekniko. Kun senlima fideleco al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ ili surgrimpis unu altaĵon post alia en tekniko. Sole en la unua duono de la kuranta jaro, ili sukcese provproduktis dek novajn tipojn de precizaj frot-ilmaŝinoj, el kiuj kvar atingis antaŭirantan internacian nivelon. Tian altan rapidecon kaj tian altan kvaliton neniam sciis la historio de la fabriko.

Due, la kontraŭrevolucia reviziisma teknika linio kaj la reakcia burĝara mondkoncepto de la ĉina Ĥruŝĉov estas profunde kritikita. La burĝaraj reakciaj teknikaj "aŭtoritatoj" estas senkreditigitaj en politiko kaj ankaŭ ilia fizionomio de papera tigro en tekniko estas plene malkaŝita. En la pasinteco, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon plenenergie idologigis la reakciajn "aŭtoritatojn" kaj admonis la junajn teknikistojn lerni de ili, "samniveleĝi kun la specialistoj" kaj "strebi por fariĝi inĝenieroj". Nun la ideologia fizionomio de multaj junaj teknikistoj ŝanĝiĝis rimarkinde. Ili komprenas, ke la strebo al famo kaj profito estas la fonto de reviziismo kaj ke oni ne devas ĉasi burĝarajn honortitolojn.

Nemalmultaj esplorantoj en la esplora instituto pri frot-ilmaŝinoj kutimis noti teknikajn informojn en siajn notlibrojn kaj ilin rigardis kiel siajn privatajn "posedaĵojn". Nun ili jam volonte transdonis tiujn al la kolektivo kaj tiuj estis disdonitaj al ĉiu por referenco kompilite en librojn. Ĉiuj teknikistoj volonte iras en la laborejon, laboras, studas kaj plibonigas ilmaŝinajn projektojn kune kun la laboristoj. Laborante en la laborejoj, ankaŭ la maljunaj teknikistoj forlasis su-perecan sintenon kaj humile lernas de la laboristoj.

Trie, ŝanĝiĝis la rilatoj inter la laboristoj kaj teknikistoj. En la pasinteco, la t. n. "kombiniĝo" elmetita de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la fabriko estis nenio alia ol tio, ke "inĝeniero laboras per lango kaj laboristo per manoj" aŭ "inĝeniero donas ideon kaj laboristo ĝin plenumas", t. e., la malnova sofismo, ke "la menslaborantoj regadas, la manlaborantoj regatas". Ili redaktis kaj eldonis *Manlibron por Laboristo en Produktado* kun pli ol 170 reguloj, kiujn la laboristoj devis lerni parkere kaj observi strikte. Ĉio ĉi tio pliprofundigis la foston inter la laboristoj kaj teknikistoj. Dum la granda kultura revolucio, efektiviĝis en la fabriko "triflanka kombiniĝo" de laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj. La ordinaraj laboristoj nun partoprenas teknikan projektadon kaj la teknikistoj manipulas maŝinojn strikte interligante teorion kun praktiko. Rezulte de tio, multe





Aŭdinte la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri revoluciigo de eduko kaj kulturo de teknikistoj inter laboristoj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko skribis dumnokte anoncon pri tiu ĝojiga novaĵo por prezenti ĝin al la revolucia komitato de sia fabriko. Ili huraas: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!"

pliboniĝis la rilatoj inter la laboristoj kaj teknikistoj.

VOJO POR KULTURI INĜENIER-TEKNIKISTOJN

La junaj teknikistoj inkluzive tiujn ĉ. 35-jarajn en la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko devenis de du fontoj: altlernejaj diplomitoj (el kiuj 10 procentoj finis aspirantecan kurson aŭ lernis kaj diplomiĝis en eksterlando) kaj teknikistoj promociitaj el laboristoj (el kiuj nemultaj estis senditaj studi kelkajn jarojn en mezgrada teknika lernejo). Faktoj montras, ke la lastaj estas pli bonaj ol la unuaj. Ĝenerale parolante, la unuaj estas pli postgigintaj en ideologio kaj malpli kompetentaj en praktika laboro, dum la lastaj estas pli progresintaj en ideologio kaj pli kompetentaj en praktika laboro. Nun-

tempe, la absoluta plimulto de la teknikistoj devenintaj de laboristoj jam fariĝis teknika spino kaj ĉirkaŭ dekono de ili kapablas memstare projekti altklasajn, precizajn kaj avangardajn novajn produktojn. La ĉefprojektoj de ses el la dek novaj precizaj frot-ilmaŝinoj sukcese provproduktitaj en la unua duono de la kuranta jaro estas teknikistoj de laborista deveno.

Selekti teknikistojn el la laboristoj estas la vojo por kulturi proletarajn inĝenier-teknikistojn.

Troviĝas okulfrapa kontrasto inter du teknikistoj de proksimume sama aĝo, kiuj havis malsamajn travivaĵojn:

Unu el ili estas diplomito de iu ŝanhaja kolegio, kiu studis speciale fremdan lingvon por unu jaro post sia diplomiĝo. Poste li iris alilanden por plua

studo, kaj kvar jarojn poste li ricevis la diplomon de "subdoktoro". En 1962, li eklaboris kiel teknikisto en la laboratorio de la Esplora Instituto de Frot-ilmaŝinoj. Homo kia li lernadis en lernejoj pli ol 20 jarojn, tamen ne akiris rimarkindan atingon en scienca esplorado, ĉar lia teoria studo disiĝis de praktiko kaj li ne bone kombiniĝis kun la laboristoj.

La alia estas laboristo, kiu eklaboris kiel metilernanto en sia 14-a jaro kaj estis sendita studi 4 jarojn en la Ŝanhaja Ilmaŝinfabrika Lernejo en lia 18-a jaro. En 1957, li komencis labori kiel teknikisto en la sama instituto. Li estis la ĉefprojektanto de granda eben-frotuma ilmaŝino sukcese provfabrikita en aprilo de la kuranta jaro, kiun oni urĝe bezonas por la disvolviĝo de la ĉina industria tekniko.

Antaŭ la granda kultura revolucio, la plenmana da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapital-

isman vojon kaj reakciaj teknikaj "aŭtoritatoj" freneze baris la laboristojn suriri la scenejon de teknika projektado. Malgraŭ tio, la teknikistoj de laborista origino trarompis unujn obstaklojn post aliaj kaj montris sian mirindan kreivan saĝon. Statistiko montras, ke el la novaj produktaĵoj de la fabriko de post 1958, tiuj desegnitaj kaj sukcese provproduktitaj de teknikistoj de laborista origino kaj de junaj teknikistoj en kunlaboro kun la laboristoj konsistigis ĉ. 60 procentojn en 1958, 70 procentojn en 1959, kaj 80 procentojn en 1960. En la jaroj post 1960, precipe de post la komenco de la granda proletara kultura revolucio, preskaŭ ĉiuj novspecaj produktaĵoj estas projektitaj kaj provproduktitaj sub ilia respondeco. Nemalmultaj el la novspecaj produktaĵoj atingis avangardajn internaciajn nivelojn. Ekzemple, la universala ilmaŝino por cilindra spegulsurfaca frotumado, la alta centra cilindra frot-ilmaŝino kaj aliaj ĉefaj produktaĵoj ĉiuj estas projektitaj kaj sukcese pro-

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko kritikis la reviziisman sciencan kaj teknikan linion de la ĉina Ĥruŝĉov.




duktitaj de teknikistoj de laborista origino.

Iuj junaj teknikistoj, kiuj estas altlernejaj diplomitoj, jam iom post iom sin liberigis el la influo de la reviziisma eduka linio, kaj kombiniĝis kun la laboristoj forĵetante sian vantan sinjorecan sintenon. Post certatempa praktikado, ankaŭ ili faris kompare rimarkindajn kontribuojn en projektado kaj provfarado de novaj produktaĵoj. Ni prenu altlernejan studenton diplomitan en 1964 kiel ekzemplon. Post veno en la fabrikon li kreis nenion por pluraj jaroj, ĉiutage procedante de teorio al teorio. En la granda kultura revolucio, altiĝis lia klasa konscio kaj lia konscio pri la batalo inter la proletara revolucia linio kaj la burĝara reaktia linio. Li decidis iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj. En la komenco de la kuranta jaro, li sukcesis en provprodukto de grava elektra ekipaĵo por frot-ilmaŝino, kune kun du laboristodevenaj teknikistoj kaj unu veterana laboristo.

Kial teknikistoj de laborista deveno progresas pli rapide kaj faras pli grandajn kontribuojn?

La plej grava kialo estas tio, ke ili havas profundan proletaran sentimenton al Prezidanto Maŭ kaj la Partio, kaj en sia militiro al la sciencotekniko ili ĉasas nek famon nek profiton, sed defias ĉiajn danĝerojn kaj malfacilojn por finfine atingi sian celon. Gravurante en la koro la instruojn de Prezidanto Maŭ, ili konstante klopodas por superi la imperiistojn, reviziistojn kaj reakciulojn en rapideco kaj kvalito kaj ankaŭ ĉiam zorgas kiel ŝpari por la ŝtato kaj kiel aranĝi la projektojn tiel, ke la produktitaj maŝinoj estas facile manipuleblaj por la laboristoj. Iuj junaj intelektuloj, venenitaj de la reviziisma eduka linio, tamen longe sin apartigis de produkta laboro kaj la laboristoj, ĉasis burĝarajn famon kaj riĉaĵon kaj atingis nenion. Kun revo famiĝi en sia kariero kaj mirigi ĉiujn aliajn en iu bela mateno, iu teknikisto sin okupis pri pli ol 60 subjektoj dum la pasintaj pli ol dek jaroj, sed, forĵetante ĉiun duonvoje, sukcesis en neniu el ili kaj malŝparis grandan sumon de ŝtata monrimedo. Esperante akiri famon, iu studento diplomita en 1956 faris eksperimentojn pri frotumaj kapoj tute per si mem kaj fuŝis pli ol 30 frotumajn




Jen juna teknikisto, kiu havis edukitecon de mezgrada teknika lernejo kaj komencis labori en tiu ĉi fabriko antaŭ tri jaroj. Li aktive partoprenas fizikan laboron, humile lernas de laboristoj kaj plibonigis kune kun laboristoj dum laborado la projektadon de frotum-kapo, kaj tial li trovas varman akcepton ĉe laboristoj.

kapojn. Poste, li turnis sin al veteranaj laboristoj por konsilo kaj kun ilia helpo li sukcesis. Li diris kun profunda kompreno el sia propra sperto: “Farante frotuman kapon post fermita pordo, mi multe suferis dolorajn fiaskojn; ĝin farante en kombino kun la laboristoj, mi dolĉe ĝuis sukceson. Oni do devas unue ‘frotumi’ sian propran kapon por fari bonan frotuman kapon.”

Ja pli okulfrapa estas la kontrasto inter la teknikistoj de laborista deveno kaj la malnovaj burĝaraj intelektuloj, kiuj havas fortegan inklinon al ĉaso de famo kaj profito. Iu burĝara “specialisto” elspezis ok jarojn por projekti frot-ilmaŝinon kaj malŝparis grandan sumon de ŝtata monrimedo, sed nenion rikoltis; li tamen akumulis iom da “konstataĵoj” kiel sian kapitalon por ĉasi famon kaj profiton. La laboristoj diras: Ĉu tia persono havas eĉ grajnnon da sentimento pri nia nova socio?

Prezidanto Maŭ diras: **“La plej saĝaj kaj plej kapablaj estas la batalantoj plej riĉaj je praktika sperto.”** En sia longa laborado, la teknikistoj de laborista deveno akumulis riĉan praktikan sperton; ili kombinis teorion kun sia praktiko, post kiam ili lernis kelkajn jarojn en postlabora ordinara aŭ teknika lernejo, tiamaniere antaŭensaltego okazis en ilia kono kaj ili rapide fariĝis kompetentaj en taskoj de scienca esploro kaj memstara teknika



Teknikisto Vang Defa (la dua de maldekstre), kiu estis antaŭe laboristo, studas iun projekton kune kun gelaboristoj.

projektado. Tio estas tre grava kialo por ilia rapida maturiĝo. Dum lernado, ili havas specifajn problemojn en sia cerbo, tial ili povas kompreni kaj apliki rapide kion ili lernas. Iu teknikisto de laborista deveno solvis komplikajn teknologiajn problemojn en prilaborado de iu produktaĵo, aplikante sian riĉan praktikan sperton. Laborante kaj samtempe lernante teorion pri metaltranĉado, li rapide altigis sian praktikan sperton al la nivelo de teorio kaj tiel formis sian certan originalan koncepton en la teknologio de metaltranĉado.

La kombino de la revolucia spirito — kuraĝi pensi, kuraĝi agi kaj kuraĝi iniciati — kun strikta scienca sinteno estas treege grava kondiĉo por inĝenier-teknikistoj surgrimpiti sciencajn kaj teknikajn kulminojn. Kaj por tion atingi, gravegaj estas la mondkoncepto kaj praktika sperto de homo. Estante liberaj de spirita kateno de inklino al ĉaso de famo kaj profito kaj havante riĉan praktikan sperton, multaj teknikistoj de laborista deveno kuraĝas rompi superstiĉojn kaj maltaŭgajn rutinojn kaj estas plej liberigitaj de konservativaj pensoj. Ni prenu kiel ekzemplon la lastatempe provproduktitan precizan frot-ilmaŝinon, kiu atingis avangardan internacian nivelon. Ĉar la teknikistoj de laborista deveno kuraĝe trarompis la longe observitajn rutinojn, ili mallongigis la provproduktan periodon de 18 ĝis 6 monatoj, la precizeco altigis je kvar gradoj, la nombro de la maŝinpartoj kaj la totala pezo ambaŭ reduktiĝis je triono kaj ĝia memkosto estas nur 15.5 procentoj de la prezo de importita

preciza frot-ilmaŝino. Iuj teknikistoj trejnitaj en lernejoj ne atentis pri sia ideologia remuldo. Ili estas zorgemaj pri siaj personaj gajnoj kaj perdoj, kaj timas perdi sian vizaĝon kaj afektan dignecon. Kaj samtempe ili jam akomodigis al diversaj reguloj kaj limigoj, tial estas malfacile por ili disrompi superstiĉojn kaj krei novajn teknikojn. Iuj el ili mem diras: “Ju pli multe da libroj oni legas, des pli peze oni sin katenas, kaj rezulte oni perdas la iniciatemon.”

Vizaĝe al elekto inter diplomitoj el altaj lernejoj kaj mezgradaj teknikaj lernejoj, la laboristoj en la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko preferas diplomitojn el mezgradaj teknikaj lernejoj, ĉar la lastaj estas malpli fieremaj, havas pli multe da praktika sperto, kaj estas ne tiom multe ligitaj de fremdlandaj rutinoj, kvankam ili havas malpli multe da ellibraj scioj. Nemalmultaj diplomitoj el mezgradaj teknikaj lernejoj progresas multe pli rapide ol studentoj el altaj lernejoj. Ekzemple, la respondeco de projektado de du altefikaj aŭtomataj produktaj linioj estas prenita de paro da lernantoj de mezgradaj teknikaj lernejoj diplomitaj en 1956.

LA DIREKTO POR LA REVOLUCIO EN EDUKO MONTRITA DE LA FABRIKO

Analizo pri la malsamaj tipoj de inĝenier-teknikaj laborantoj en la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko kaj pri la vojoj iritaj de ili montras al ni la direkton por la revolucio en eduko.

En praktiko, la veteranaj laboristoj kaj multaj el la junaj teknikistoj de la fabriko jam komprenas

pli profunde la senkompareblan saĝecon kaj korektecon de la instruado de Prezidanto Maŭ: "... la regado de burĝaraj intelektuloj super niaj lernejoj nepre ne devas daŭri plue." Ili sentas, ke neniom prokrastenda grava afero estas konduki proletaran revolucion en eduko laŭ la penso de Prezidanto Maŭ pri eduko. La serio da instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri la revolucio en eduko jam montris al ni la direkton por antaŭenmarŝo. La nuna demando estas agi sensanceliĝe kaj fidele laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ.

Surbaze de la penso de Prezidanto Maŭ pri eduko kaj la praktika sperto de la fabriko, la laboristoj kaj teknikistoj elmetis kelkajn opiniojn kaj ideojn koncerne al la revolucio en eduko:

Unue, kiel Prezidanto Maŭ montras, lernejoj devas kulturi **"laborulojn kun socialisma konscio kaj kulturo"** sed ne "intelektajn aristokratojn", apartiĝantajn de proletara politiko, de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj de produkta praktiko, kiajn la reviziisma eduka linio porpledis. Tio ĉi estas radikala problemo ĉu naskiĝos reviziismo aŭ ne. Kamaradoj en la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko opinias, ke malracia estis la aranĝo en la pasinteco, ke altlernejaj diplomitoj eklaboru kiel kadroj en fabrikoj aŭ kamparo tuj post ilia forlaso de la lernejoj. Sinkombini kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj partopreni produktan laboron estas la grava vojo por junaj lernantoj remuldi sian mondkoncepton kaj akiri praktikan teknikan scion.

Due, lerneja eduko nepre devas kombiniĝi kun produkta laboro. Prezidanto Maŭ diras: **"Nia ĉefa metodo estas lerni militi en milito."** En la kazo de iuj teknikaj laborantoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko oni vidas, ke unu el la seriozaj malutiloj de la malnova eduka sistemo estis, ke teorio estis apartigita de praktiko kaj skolastiko ludis viglan rolon, tiel ke la lernantoj fariĝis librovermoj kaj ju pli ili lernis, des pli ili stultiĝis. Nur per partopreno en praktiko, oni povas rapide mastri teorion, profunde ĝin kompreni kaj kreive ĝin apliki. Laboristoj kaj teknikistoj de tiu ĉi fabriko

elmetis la opinion, ke lernejoj devas inviti spertajn laboristojn por instruado, tiel ke laboristoj aperu sur la katedro. Iuj lernobjektoj povas esti instruataj de laboristoj en laborejoj.

Trie, rilate al la fonto de inĝenier-teknikaj laborantoj, ili opinias, ke krom daŭrigo de promociado de teknikistoj el la laboristoj, diplomitoj el malsuperaj kaj superaj mezlernejoj, kiuj estas bonaj en politik-ideologio kaj havas produktan sperton de 2 ĝis 3 aŭ 4 ĝis 5 jaroj, povas esti selektitaj el la bazaj unuoj kaj senditaj al altaj lernejoj por studo. Nun ekzistas ĉiuj necesaj kondiĉoj por tion fari. Ni prenu la Ŝanhajan Ilmaŝinan Fabrikon kiel ekzemplon. La plejparto de ĝiaj laboristoj posedas klarecon egalan al aŭ super tiu de diplomito de malsupera mezlernejo. La avantaĝo en selektado de tiaj junuloj por studo en altaj lernejoj estas jenaj: Ili havas relative bonan politik-ideologian fundamenton, certan praktikan laborkapablon kaj produktlaboran sperton; kaj mezlernejaj diplomitoj aĝas ĉirkaŭ 20 jarojn post kelkjara laboro, kaj post kelkjara plua studado ili povas memstare labori diplomite je la aĝo de 23 ĝis 24 jaroj, sed nun altlernejaj diplomitoj povas iom post iom fariĝi kapablaj labori memstare ĝenerale nur post 2-3-jara praktikado post kiam ili estas instalitaj en laborposteno. Tial, selekti kaj sendi junajn intelektulojn kun praktika sperto al altlernejo por kulturado konformas al la principo "multe, rapide, bone kaj ekonomie."

Revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Ŝanhaja Scienca kaj Teknika Universitato kaj kamaradoj de PLA de la milittrejna grupo kune studas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ pri revoluciigo de eduko kaj kulturo de teknikistoj inter laboristoj.



En la Mezlernejo Jan-an

LA 7-an de marto, 1967, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la jenan noton sur la raporto de la Mezlernejo Jan-an en Tiangin: “. . .Niaj trupoj devas efektiviĝi militan trejnadon al la lernantoj de altaj kaj mezaj lernejoj kaj al tiuj de la altaj klasoj en elementaj lernejoj laŭvice en grupoj kaj partopreni en la laboroj pri rekomenco de lernado, reordigo de organizo, fondo de gvida organo de triflanka kombiniĝo kaj efektivigo de batalo, kritiko kaj reformo* en lernejoj.”

Antaŭnelonge ni havis ŝancon viziti la nomitan lernejon kaj propraokule vidis sukcesojn atingitajn de ĝiaj revoluciaj instruistoj kaj lernantoj en la eduka revolucio, sub la stimulo de la brila noto de Prezidanto Maŭ.

KLASBATALO — NEPRE PRENINDA LECIONO POR LERNANTOJ

La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la Mezlernejo Jan-an levis altan tajdon de batalo, kritiko kaj reformo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: “Tiel same estas ankaŭ por la lernantoj. Kun lernado kiel sia ĉefa tasko, ili devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn, tio estas, aldone al siaj lernejaj studoj, ili devas lerni ankaŭ industriajn, agrikulturajn kaj militajn aferojn. Ili devas ankaŭ kritiki la burĝaron.”

En iu tutlerneja revolucia kritika kunveno, la ruĝa gvardiano Ki Ŝenghe suriris la podion kaj akuzis antaŭ la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, kiel la malnova eduka sistemo venenis lin. Tiu juna revolucia batalanto devenas de malriĉkamparana familio. El la suferplena travivaĵo de sia patro en la malnova socio, li bone komprenas la dolĉon de la nova socio. Li senlime amas Prezidanton Maŭ kaj tutkore deziras bone lerni la penson de Maŭ Zedong en la lernejo kaj havigi al si kapablon servi al la popolo. Tamen, la mezlernejo donis lecionojn nek pri klasbatalo, nek pri

produkto, sed postulis ke la lernantoj sin fermu ĉiutage en klasĉambro por parkere memori tiujn difinojn, konceptojn kaj formulojn, kiuj havas nenian ligon kun proletara politiko, klasbatalo kaj produkta laboro. La pezaj hejmaj taskoj tenis lin en eksterordinare granda streĉado. Kiam li provis zorgi pri tiu lernobjekto, ne eblis por li sinokupi pri la aliaj, kaj fine li eĉ ne sukcesis avanci en la fino de lernojarlo. La indigna akuzo de Ki Ŝenghe plie vekis senkomparan malamon de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj al la ĉina Ĥruŝĉov. Senĉese aŭdiĝis en la kunveno la sloganoj: “Faligu la ĉinan Ĥruŝĉov!” “Ĝisfunde frakasu la malnovan edukan sistemon!”

Ĉiam pli ardiĝis la fajro de revolucia amasa kritiko, kaj fariĝis pli kaj pli klare al la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, ke la plej grava el la miloj da krimoj de la reviziisma eduka linio disvastigita de la ĉina Ĥruŝĉov estas tio, ke ĝi oponas kontraŭ la brila penso de Prezidanto Maŭ “**Eduko devas servi al la proletara politiko**”, provante tiri junajn lernantojn disde klasbatalo kaj produkta laboro por ke ili senkonscie suriru reviziisman vojon. Tial, por levi sian klasan konscion, en la tempo de sia energia kritikado kontraŭ la reviziisma eduka linio de la ĉina Ĥruŝĉov, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj invitis laboristojn, malriĉkamparanojn, malsuperajn mezkamparanojn kaj PLA-anojn al la lernejo por doni lecionojn de klasa eduko en formoj de rememoro pri la pasinta amaro kaj penso pri la nuna feliĉo kaj raporto pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong. En iu tago, la tria klaso invitis maljunan laboriston por doni tian lecionon. Kiam tiu vive rakontis, kiel li estis kruele ekspluatata de kapitalistoj en la malnova socio, kaj ke estis Prezidanto Maŭ, kiu savis lin el la infero, kaj tial li decidis fari revolucion por la tuta vivo, sekvante Prezidanton Maŭ, la lernantoj ĉiuj estis emociitaj ĝis larmo. Ili senĉese kriis: “Neniam forgesu

la klasajn suferojn, ĉiam memoru la verŝitajn sangojn kaj larmojn!” “Ĉiam sekvu Prezidanton Maŭ por fari revolucion!” Li Hiufang, filino de laborista familio kaj ĉefa membro de la estraro de la klaso, jam esprimis la deziron forlasi sian oficon pro la konsidero, ke tiu ĉi laboro estas peniga, sendanka kaj cetere temporaba malfavore al persona lernado. Post kiam ŝi aŭskultis la raporton de la maljuna laboristo kaj krome prenis amarrememorigan manĝon, ŝi konsciiĝis, ke ŝi forgesis sian devenon kaj estas trompita de la ĉina Ĥruŝĉov. Kun varmaj larmoj en la okuloj, ŝi faris antaŭ la tuta klaso memkritikon kaj aktive partoprenis la revolucion amasan kritikon.

Revoluciaj instruistoj kaj lernantoj diris: “Klasbatalo estas nia ĉefa lernobjekto. La ĉina Ĥruŝĉov volis ĝin forhaki, sed ni devas decideme ĝin alpreni!” Depost la rekomenco de lernado**, ili jam aranĝis kelkdekojn da tiaj klasedukaj lecionoj per rememoro pri la amara pasinteco kaj penso pri la nuna feliĉo. Ĉiu tia leciono plialtigis la klas-konscion de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj pliprofundigis ilian klasan amon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

TUTE NOVA LECIONO PRI LINGVO

Post la rekomenco de lernado en la Mezlernejo Jan-an, la enhavo de la unua leciono pri lingvo estis

la brila verko de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj diris: “Tiu ĉi leciono devas esti ne nur farata bone, sed ankaŭ kun nova kreaĵo.” Tiel, la instruisto kiu respondecis pri donado de tiu leciono, ŝanĝis la malnovan manieron de preparado skribi instruajn projekton en fermita ĉambro disde la lernantoj kaj realeco, kaj iris inter la vastajn amasojn de revoluciaj ruĝaj gvardianoj kaj instruistoj por peti konsilojn. La lastaj aktive donis bonajn ideojn por bone fari tiun lecionon. Post zorgema kaj detala kolektiva preparado, la prelegonta instruisto plena de memfido venis en la klasĉambron. Tiu ĉi leciono estis komencita de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj per kuna recitado de la verko *Servu al la Popolo*. Dum la prelego la instruisto multe parolis pri la brila figuro de kamarado Ĝang Side, kiu “senrezerve” kaj “ekskluzive” servis al la popolo, kaj rakontis multajn kortuŝajn prikantindajn heroaĵojn de revoluciaj martiroj sur batalkampoj aŭ en malamika juĝejo. Li per konkretaj faktoj konvinke klarigis, ke studante tiun verkon, oni devas frakasi egoismon kaj starigi kolektivismon kaj formi al si komunisman mondkoncepton de tutkora servado al la popolo. Krome li laŭdis la bonajn homojn kaj bonajn agojn troviĝantajn inter la lernantoj kaj ankaŭ parolis pri sia komprenajo akirita en studo de tiu verko. La leciono multe kortuŝis la lernantojn, kaj ĉiuj esprimis ke ili nepre



Kamaradoj de la militrejna grupo en la Mezlernejo Jan-an studas la projekton de eduka reformo kune kun revoluciaj instruistoj.

imitos kamaradon Ĝang Side. Tre vigla atmosfero regis en la klasĉambro.

La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la lernejo diris kun profunda konvinkigo, ke la farita leciono ne nur ŝanĝis instruan manieron, sed ankaŭ estas revolucio en instrua penso. En la pasinteco la malnova instrua penso havis egoismon kiel la kernon. La ĉina Ĥruŝĉov uzis "salajropiigon kaj promocion" kaj aliajn rimedojn por instigi instruistojn labori por egoisma celo kaj disvastigis inter lernantoj la penson de strebado al famo kaj specialisteco, por ke ili vermu en librojn por "persona estonteco". Nun la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj prenas la "tri popularajn artikolojn" kiel armilon por batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon. La instruistoj kaj lernantoj starigis al si respektive la penson instrui kaj la penson studi por revolucio. En la klasĉambro ili akiras ne nur klarecon kaj sciojn, sed ankaŭ la penson de Maŭ Zedong.


IRI EL KLASĈAMBRO AL PRAKTIKADO

La lernantoj de la trijara klaso de la lernejo ricevis neordinaran matematikan lecionon en la kvara produkta grupo de Hongki-brigado, King-

guang-popolkomunumo, en la norda antaŭurbo de Tiangin. Tie ili petis kontiston de la grupo doni al ili lecionon pri kontado. La kontisto estas junulo. Kvankam li ne longe vizitis lernejon, tamen la kontojn li bonorde registris kaj faris neniam erarojn. Pro tio la komunumanoj nomas lin "ruĝa intendanto". La junulo unue elmontris kontolibrojn kaj poste komencis doni la lecionon. Li laŭvice klarigis, kiel oni registras laborpoentojn, administras la posedaĵojn kaj klasifikas la kontojn. La klarigado estis facile komprenebla. Ju pli la lernantoj aŭskultis, des pli ili estis interesitaj. Ili senĉese kapjesis dirante: "Tia matematiko ja estas vera matematiko." La viveca matematika leciono finiĝis en varmaj aplaŭdoj.

Ĉirkaŭ la Mezlernejo Jan-an troviĝas multaj fabrikoj kaj ankaŭ produktaj brigadoj de popola komunumo. Tamen, antaŭ la granda proletara kultura revolucio, la lernobjektoj de la lernantoj havis nenian ligan kun la praktiko de tiea industria kaj agrikultura produktado. Foje iu lernanto estis elektita de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kiel kontisto, kiam li revenis al sia brigado post la fino de lernado en la lernejo; sed li ne sciis kiel registri laborpoentojn

Prezidanto Maŭ konfirmis la raporton pri sperto de la milittrejna grupo en la Mezlernejo Jan-an kaj donis la brilan instrukcion de la 7-a de marto. Tiu eksterordinare ĝojiga novaĵo lumigis tiun mezlernejon kvazaŭ ruĝa radianta suno. La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj estis kuraĝigitaj ĝojplene kaj tuj okazigis celebran kunvenon.



en kontolibron. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: “Tiel multe da scioj vi lernis el libroj, tamen ili ne estas tiom utilaj kiom la abako de nia loka, neinstruita kontisto.” La rimarko de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj inspiris kaj edukis la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn. En la eduka revolucio, ili ĝisfunde kritikis la reviziisman lernomaterialon disvastigitan de la ĉina Ĥruŝĉov, havantan nenian ligon kun produkta praktiko, kaj decidis mem kompili tutan serion da matematika lernomaterialo kun tute nova enhavo, en kiu teorio kombiniĝas kun praktiko, por ke la lernantoj post lernado povu apliki la matematikajn fundamentajn sciojn en solvado de praktikaj demandoj en industria kaj agrikultura produkto kaj en servado al socialisma konstruado.

En lastaj kelkaj monatoj, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj iris el la klasĉambroj kaj profundigis en fabrikojn kaj popolajn komunumojn por lerni de la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj. Surbaze de la vaste faritaj esplorado kaj enketado, ili komencis la kompiladon de matematika lernomaterialo kaj atingis unuapaŝan rezulton.

IRU INTER LA LABORISTAJN KAJ KAMPARANAJN AMASOJN

En la alta tajdo de eduka revolucio en la Mezlernejo Jan-an, alia grupo da lernantoj finis sian lernadon. Estis kortuŝe, ke ĉiuj petis konkure iri al landlima regiono por subteni socialisman konstruadon. Unu el ili estis la multe laŭdata filino de malriĉkamparano Ĝang Likin.

“La lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado, kaj la regado de burĝaraj intelektuloj super niaj lernejoj nepre ne devas daŭri plue.”

La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj juras venkopreni la pozicion okupitan de la reviziisma eduka linio.



La lernantoj partoprenas agrikulturan laboron.

Jam en 1965, la patro kaj pliĝa fratino de Ĝang Likin memvole iris al landlima regiono por subteni la socialisman konstruadon de la patrujo, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “Sin prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ natura katastrofo kaj servi al la popolo”. Ĝang Likin pensis en si: Ĉar mi estas ruĝa gvardiano de Prezidanto Maŭ, mi des pli devas aŭskulti liajn vortojn kaj iri tien kie la patrujo plej bezonas min. Tial ŝi decideme prezentis petskribon al la Revolucia Komitato de la lernejo kaj samtempe skribis al sia patro kaj fratino pri sia decido. Sed kontraŭe al ŝia supozo, la patrino ne konsentis al ŝi iri malproksimen, pretekstante ke ŝi estas ankoraŭ tro juna. Pro tio Ĝang Likin treege maltrankviliĝis. Reveninte hejmen ŝi provis konvinkisian patrinon per rememorigo pri la pasinta amaro kaj pensigo pri la nuna feliĉo: “En la malnova socio, ni eĉ ne povis vivteni nin kaj devis ĉie migri kaj almozpeti. Nur la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ nin savis. La laboranta popolo ebligis al mi viziti lernejon, kaj nun estas bezonate ke mi



Junaj intelektuloj, kiuj partoprenas la produktan laboron en agrikultur-paŝt-ejo "Laborista-Kampana Alianco" en Tiangin, rakontas sian personan sperton al la novaj diplomitoj de la Mezlernejo Jan-an kaj plifirmigas ilian revolucionan decidon kombiniĝi kun la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj.

servu al la popolo. Se mi nur konsiderus pri miaj personaj profitoj, kiel mi povus respondi al nia amata Prezidanto Maŭ!" Ŝiaj vortoj pli kaj pli vekis ĉe la patrino profundan malamon al la malnova socio kaj senliman amon al Prezidanto Maŭ, tiel ke la penso de ŝia patrino iom post iom ŝanĝiĝis. Tamen, en la komenco la patrino konsentis nur, ke Ĝang Likin iru al la loko kie estas la patro kaj fratino, opiniante ke tiel la filino povos subteni socialisman konstruadon kaj samtempe ankaŭ trovi prizorgadon ĉe la patro kaj fratino kaj ŝi mem ankaŭ povos esti trankvila. Ĝuste en tiu tempo, la patro kaj fratino de Ĝang Likin alsendis leteron varme subtenantan ŝian revolucionan agon. Dank' al la persvado de Ĝang Likin kaj ekzemplo de aliaj familianoj, la patrino fine konsentis, kaj persone iris al la lernejo por enregistri la nomon de sia filino por iri al landlima regiono.

Informiĝinte pri tio la revolucionaj junaj batalantoj de la klasoj, kiuj finis la lernadon, amase esprimis, ke la deziro de Ĝang Likin estas ankaŭ la ilia. Ili ĉiuj rigardis la pretecon de la gradiĝintoj por partopreni socialisman konstruadon en landlima regiono kiel venkon de la eduka revolucio. Por akiri permeson pli frue partopreni socialisman konstruadon en landlima regiono, ili amase esprimis

per skriboj sian decidemon kaj postulon al la lerneja Revolucia Komitato. Ĉiuj skriboj esprimis la komunan deziron de la ruĝaj gvardianoj: "Nepre iri en ŝtormon de klasbatalo por sperti venton kaj pluvon, vidi la mondon, hardi la ruĝan koron senlime fidelan al Prezidanto Maŭ kaj fariĝi fidindaj daŭrigantoj de la revolucionaria afero de la proletaro!"

* Pri "batalo, kritiko kaj reformo" vidu "Enciklopedieton" en n-ro 1, ĉi-jare.

** "Revolucii en rekomencita lernado" estis batala alvoko farita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al revolucionaj instruistoj kaj lernantoj.

Post la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio de nia lando, la ruĝaj gvardianoj de la lernejoj sturmis al la socio por forbalai la malnovajn ideojn, kulturojn, morojn kaj kutimojn kaj starigi la novajn. Ili atakis furioze la plenmanon da reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, kaj faris senmortan meriton por la granda proletara kultura revolucio. En marto de la pasinta jaro, laŭ la bezono de la nova situacio en la batalo varme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ, la revolucionaj instruistoj kaj lernantoj revenis al siaj lernejoj kaj levis altan tajdon de batalo, kritiko kaj reformo.

Malnova Lerneja Sistemo de Ĉinio

EN Ĉinio la tuttaga lernejo por ĝenerala instruado estas dividita en tri gradoj (elementa lernejo, meza lernejo kaj alta lernejo) kun ses ŝtupoj (malsupera elementa lernejo, supera elementa lernejo, malsupera meza lernejo, supera meza lernejo, alta lernejo kaj studentaro de altaj studoj). Tiu lerneja sistemo jam fundamente konturiĝis en la unua lerneja sistemo publikigita jam en 1903 de la registaro de King-dinastio. Kompare kun la nuna lerneja sistemo, la diferenco kuŝas en tio, ke la tiama meza lernejo ankoraŭ ne estis dividita en du ŝtupojn superan kaj malsuperan, sed antaŭ la regulaj kursoj la alta lernejo ne havis preparajn kursojn, kaj la tuta daŭro de lernado de elementa lernejo ĝis la fino de alta lernejo bezonis dudek ĝis dudek unu jarojn. La diversgradaj kaj diversspecaj lernejoj dediĉis specialan atenton al la instruado de konfuceanismaj klasikaj kaj feŭdisma etiko. Tiam la sistemo de feŭda ŝtata ekzameno kvankam jam estis abolita, sed la lernejoj en granda mezuro ankoraŭ portis la koloron de tiu feŭda sistemo. La fina ekzameno de la lernejoj imitis ankoraŭ formon de la abolita feŭda sistemo. La diplomitoj ricevis laŭ sia grado titolojn, kiujn ricevis antaŭe la sukcesintoj en la feŭdaj ŝtataj ekzamenoj, ekzemple, la diplomito de regula alta lernejo ricevis la titolon *ĝinŝi-o*, kaj tiu de la preparaj kursoj de alta lernejo la titolon *ĝufen-o*. La diplomitoj povis ricevi ankaŭ diversajn oficistajn titolojn konforme al sia grado.

Post la Revolucio de 1911, la lerneja sistemo estis reviziita, nominale estis ĉesigitaj la instruado de konfuceanismaj klasikaj en elementaj lernejoj kaj la dono de titoloj al diplomitoj, kaj ankaŭ la tuta daŭro de lernado estis mallongigita je tri jaroj. Sed en plejparto de la elementaj kaj mezaj lernejoj la lernantoj ankoraŭ kultis Konfuceon kaj studis konfuceanismajn klasikajn; ilia malnova aspiro al titoloj kaj rangoj ne multe malpliĝis, dum la sklaveca tendenco de kompradoro lakee servema al fremduloj multe pli serioziĝis ĉe ili.

Post la Unua Mondmilito, la pragmatismaj edukaj ideoj de la usona imperiismo pli furioze invadis nian landon. En 1922 la lerneja sistemo estis ree reviziita; ĉifoje, anstataŭ la japana, la usona sistemo estis kopiita, ekzemple, la lernotempo de elementa lernejo daŭris de nun ses jarojn anstataŭ sep, la kvarjara mezlernejo fariĝis sesjara, dividita en malsuperan kaj superan kun lernotempo de po tri jaroj, kaj la preparaj kursoj de alta lernejo estis nuligitaj. Tamen la tuta lernotempo de la tri gradoj de lernejoj kune ankoraŭ daŭris dek ses ĝis dek ok jarojn.

Post la Liberiĝo, la ĉina Ĥruŝĉov transprenis tiun lernejan sistemon preskaŭ tute senŝanĝe kaj aldone ŝmiris sur ĝin reviziisman olean kolorilon, farante ĝin miksaĵo de la tri venenaĵoj: feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo.

La tempdaŭro de la malnova lerneja sistemo estas strange longa. Ĝi enkorpiĝis la bezonojn de ĉiuj ekspluataj klasoj. La lernantoj estis edukitaj en intelektajn aristokratojn, kiuj malamas laboristojn kaj kamparanojn, malŝatas fizikajn laborojn kaj malestimas praktikon. Kunordigite kun aliaj ĉeneroj de la eduka sistemo de la ekspluataj klasoj (kursaro, ekzameno, instru-materialo, instru-metodo, ktp.), la longtempa lerneja sistemo formis grandan maŝinon uzatan de la ekspluataj klasoj por fabriki siajn posteulojn.

La malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj akuzis: “La longtempa lerneja sistemo estas ‘Pasejo al Infero’ por malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj,” kaj “la linio de poentoj estas la restaŭra linio de la burĝaro kaj la blokada linio por ekskluzivi la infanojn de laboristoj kaj kamparanoj.”

Prenante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “la lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado” kiel orientilon, la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de nia lando nun klopodas ĝisfunde frakasi la malnovan lernejan sistemon.

Laŭ la Vojo de Kombiniĝo kun Laboristoj kaj Kamparanoj

LA junularo estas la estonteco de la lando kaj la estonteco de la tuta mondo. Kiajn daŭrigantojn eduki estas tre grava problemo konceranta la estontecon de la lando kaj la sorton de la homaro.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj revoluciaj junulaj amasoj de nia lando firme iras la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj. Kreskante kaj sin hardante en la ventegoj kaj ondegoj de klasbatalo, ili reformas sin iom post iom en

daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro, kiuj estas ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al lia proletara revolucia linio.

Kiel oni povas hardi sin en daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro? La ununura vojo estas iri firme la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

Kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj estas la revolucia direkto montrita de nia granda instruanto Prezidanto Maŭ al la juna generacio.

Ruĝaj gvardianoj de la mezaj lernejoj, altaj fakaj lernejoj kaj universitatoj en Lanĝoŭ ĵuras revolucii sekvante Prezidanton Maŭ kaj iri laŭ la bezonoj de la revolucio al la kampoj, fabrikoj, minejoj, landlimaj regionoj kaj bazaj organizoj, por esti bonaj gefiloj de la laboranta popolo kaj fordoni sin plene por la Partio kaj la popolo.



Li diris: “Kion oni prenu kiel kriterion por juĝi, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Per kio oni lin distingu? La ununura distingilo estas, ĉu li volas aŭ ne volas kaj praktikas aŭ ne praktikas kombiniĝon kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj.”

La laboristaj kaj kamparanaj amasoj estas la movforto kreanta la mondan historion kaj la ĉefa forto de revolucio. Nur kombiniĝante kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, la juna generacio povas fari grandan revolucion batalon. Nur tiuj junuloj, kiuj lernas de laboristoj kaj kamparanoj kaj starigas al si la mondkoncepton de tutanima kaj tutkora servado al la popolo, indas la nomon de revolucia junulo.

Kiel ĉiuj aliaj reprezentaj personoj de ekspluataj klasoj, la ĉina Ĥruŝĉov ĉiam oponas kontraŭ laboristoj kaj kamparanoj, malestimas ilin, kaj oponas kontraŭ la kombiniĝo de la junularo kun laboristoj kaj kamparanoj.

Antaŭe en la periodo de Kontraŭjapana Rezistmilito, la ĉina Ĥruŝĉov jam disvendis sian nigran varon *Memkulturo* por oponi kontraŭ la kombiniĝo de la junularo kun laboristoj kaj kamparanoj. Post la Liberiĝo de la tuta lando, pretekstante la bezonojn de la nova situacio de ekonomia konstruado, la ĉina Ĥruŝĉov energie distrumpetis la vojon de “blanka specialisto”, kiu sin dediĉas ekskluzive al faka studo, la vojon de individua luktado por famo kaj specialisteco. Li diris, ke por la junulo gravas “ĉefe lerni kulturon kaj teknikon”, ke “se li nur lertigos sin en unu fako, li fariĝos fama kiel specialisto kaj havos ĉion.” Per tio li logis la junulojn disiĝi de la proletara politiko kaj de laboristoj kaj kamparanoj, por fariĝi mensaj aristokratoj alte lokantaj sin super la laboranta popolo.

Post la efektivigo de la agrikultura kooperativigo de la tuta lando en 1955, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon: “**Ĉiuj intelektuloj, kiuj povas labori en la kamparo, devas ĝoje iri tien. La kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari.**” Varme respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, grandaj nombroj da junuloj sinsekve iris al la montoj kaj la kamparo, por iri la revolucion vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj. En tiu ĉi situacio, la ĉina Ĥruŝĉov ŝanĝis sian artifikon kaj iris ĉien por distrumpeti ke iri al la kamparo ne estas “malprofito”, oni povas fariĝi “ŝtatoficistoj” estonte. Li diris absurde: “Vi posedas kleracon”, “terkulturu 3 ĝis 5 jarojn” en la kamparo, “starigu bonajn rilatojn kun la amaso”, kaj tiel eblos al vi pretendi okupi



Juna intelektulino el Ŝanhajo, kiu fiksoĝas en la kamparo de Gujĝoŭ-provinco, propagandas la penson de Maŭ Zedong al la mjaŭaj malriĉkamparaninoj kaj malsuperaj mezkamparaninoj.

la seĝon de “estro de kooperativo, de subdistrikto aŭ de gubernio” kaj “fariĝi membro de la Centra Komitato” ktp. Laŭ li, portempa partopreno en fizika laboro celas disiĝi de ĝi por ĉiam, kaj portempa vivado inter laboristoj kaj kamparanoj celas grandsinjore rajdi por ĉiam sur la nuko de la laboranta popolo. Prezidanto Maŭ instruas al ni: “**Ni komunistoj ne celas fariĝi ŝtatoficistoj, sed fari revolucion.**” La krima celo de la ĉina Ĥruŝĉov distrumpetanta la filistran filozofion de promocio kaj riĉiĝo estas retiri la junularon al la senlireja vojo de burĝara individuismo for de la revolucia vojo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

Sennombraj historiaj faktoj pruvis ke, kiu disiĝas de laboristoj kaj kamparanoj, disiĝas ankaŭ de la revolucio, kaj ke, kiu oponas kontraŭ laboristoj kaj kamparanoj, oponas ankaŭ kontraŭ la revolucio. Depost la Movado de la 4-a de Majo, en la junulara movado dum dekoj da jaroj aperis

multaj elstaraj personoj. Sed, post nelonga tempo, iuj atingis nenion kaj malaperis efemere kiel rapidaj pasantoj sur la historia scenejo, pro sia disiĝo de laboristoj kaj kamparanoj; aliaj iris en la kontraŭrevolucion tendaron, pro sia opono kontraŭ laboristoj kaj kamparanoj. Nur tiuj, kiuj persiste kombiniĝas kun laboristoj kaj kamparanoj kaj firme sekvas la revolucion vojon montritan de Prezidanto Maŭ, povas hardi sin en firmajn proletarajn batalantojn, konservi al si ĉiam la revolucion junecon kaj senĉese fari novajn meritojn por la popolo.

Tio estas problemo de mondkoncepto, ĉu oni povas persisti en kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj aŭ ne. Por logi la junularon disiĝi de laboristoj kaj kamparanoj kaj iri la kapitalisman vojon, la ĉina Ĥruŝĉov jen propagandis "legadon de libroj en fermita ĉambro" por fariĝi fama kiel specialisto, jen distrumpetis "orizi sin en la kamparo" por poste grimpi al pli alta rango. Ĉiuj varioj senescepte nedisigeble alteniĝas al la kerno de "egoismo". Ni devas frakasi la "egoismon" de la burĝaro kaj starigi la "kolektivismon" de la proletaro kaj serioze remuldi nian mondkoncepton. Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"La ŝanĝiĝo de mondkoncepto estas ŝanĝiĝo radikala."** Oni povas vere kombiniĝi kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj en la penso kaj sento kaj subigi siajn individuismen, subjektivismen, anarkiismen kaj diversajn aliajn ideojn de la burĝaro kaj starigi la komunisman mondkoncepton de tutanima sindediĉo al la kolektivo, nur kiam en longdaŭra revolucia batalado kaj en la procezo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj, oni senĉese studas kaj aplikas kreive la verkojn de Prezidanto Maŭ, laŭ lia granda instrukcio **"Kontraŭbatali egoismon, kritiki reviziismon."** Tio estas la revolucia direkto, en kiu la juna generacio devas persisti en sia batalo dum la tuta vivo.

La juna generacio de Ĉinio, kiu estas hardita kaj provita en la granda proletara kultura revolucio, rigardas ami laboristojn kaj kamparanojn, kombiniĝi kun ili kaj lerni de ili kiel unu el la gravaj signoj de fideleco al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al lia proletara revolucia linio. En la sonado de la triumfa kanto de plenampleksa venko de nia granda proletara kultura revolucio, kun fidela koro al la revolucia afero, aroj kaj aroj da junuloj ĝoje suriras la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj kaj ĵetas sin en la varman revolucion batalon de laboristaj kaj kamparanaj amasoj por hardi sin en fidelajn daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.

NOVA MALGRANDTIPA TRAKTORO PROVE FABRIKITA

Disvolvante la revolucion spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi kaj sub la forta subteno de la koncernaj frataj unuoj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝigiaĝuang-a Dizel-fabrika sukcesis en provfabrikado de traktoro de malgranda tipo sub la nomo modelo "Sepa de Majo" 124.

Tiu modelo posedas la avantaĝon esti multflanke uzebla, facilmovaj kaj malpeza, taŭga en plugado, semado, drenado, irigacio kaj transportado, tiel en montregiono kiel sur ebenejo. Prova uzado en la ĉirkaŭurbo de Ŝigiaĝuang kaj en Gingging kaj aliaj gubernioj pruvis ĝian bonan kvaliton. Tial ĝi trovas bonvenigon inter la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



LA UNUA MEZPREMA VERTIKALA CIKLONA KALDRONEGO EN NIA LANDO

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, disvolvante la revolucion spiriton sinapogi sur la propraj fortoj kaj strebi al prosperiĝo, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Kingdaŭ-a Elektrejo sukcesis utiligi malnovan kaldronon por konstrui mem-projektitan mezpreman vertikalan ciklonan kaldronon, kiu estas la unua de tia speco en nia lando. Ĝi estas karakterizata per malgrandeco de la korpo kaj ĝia alta efiko. La kosto de elektro de ĝi produktita estas malalta, kaj malofte okazas al ĝi akcidento de fajroestingiĝo. La sukcesa rekonstruo de la kaldrono liveris praktikan sperton de fabrikado de ciklonaj kaldronoj kaj malfermis novan vojon al ŝparo de karbo en elektroproduktado kaj utiligo de karbo malbonkvalita.

Nova Paŝtisto el Pekino

*Ruĝaj gvardianoj, kiuj Prezidanton Maŭ aŭskultas pleje,
Enradikiĝas sur la stepo de Interna Mongolio;
Ili ĵuras esti bonaj idoj de l' popolo laboranta,
Dediĉantaj al ĝi la junecon sian, batalplenan.*

La versoj estas verkitaj de Vu Hiaŭmin, nova paŝtisto sur la Okcidenta Vuĝumukin-stepo de Interna Mongolio kaj lernantino el Pekino. Tiuj versoj plene montras ŝiajn realajn pensojn kaj sentojn en la pli ol duonjara fiksloĝado en Interna Mongolio.

Vu Hiaŭmin estis lernantino de la Pekina Tria Knabina Mezlernejo. Ŝi pasigis sep jarojn en lernejo kie regis la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio. En sia pasinta vivo, ŝi neniam spertis fizikan laboron kaj ricevis ĉiam pretajn manĝaĵojn kaj vestaĵojn. Antaŭe ŝi opiniis ke labori en montaro aŭ kamparo ne havas vastajn perspektivojn, kaj nur multe studi en lernejo estas fierinde. La proletara kultura revolucio, iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ, sonigis la funebran sonorilon por la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estrataj de la ĉina Ĥruŝĉov, forlavis la ideologiajn malpuraĵojn de homoj kaj skuis ankaŭ la penson de Vu Hiaŭmin. En la proletara kultura revolucio ŝi komencis vere preni la studon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la unuan bezonon en la vivo. Sub la nutrado de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, ŝi profunde ekkomprenis, ke ŝia antaŭa penso estas ĝuste la rezultato de la venena admono de la ĉina Ĥruŝĉov: “ŝtopi al vi la orelojn kontraŭ ĉio ekster la fenestroj kaj alpreni al la koro nur la librojn de sanktuloj.”

En la pasinta vintro, nombro da mezlernejaj diplomitoj de la ĉefurbo, kiuj kuraĝe sturmis en la kultura revolucio, brave iris al Interna Mongolio por aniĝi al popolaj komunumoj sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke intelektuloj devas kombini sin kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj,

Informiĝinte pri tio tuj post la reveno de sia laboro en la antaŭurba kamparo, Vu Hiaŭmin estis multe kuraĝigita. Ŝi ripetade pensis, ke kvankam ŝi ankoraŭ ne finis la mezlernejan studadon, tamen, ankaŭ ŝi devas iri, ju pli frue, des pli bone, la revoluciigan vojon montritan de Prezidanto Maŭ kombiniĝi kun laboristoj kaj kamparanoj, por aldoni brilon al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la granda proletara kultura revolucio. Ŝi decidis iri al Interna Mongolio kune kun la diplomitoj por fariĝi ordinara laborulo kaj hardi sin en firman daŭriganton de la revolucia afero de la proletaro en la tri grandaj revoluciaj bataloj, nome: produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimentado.

Ŝi diris sian decidon al la gepatroj. Sed la patrino ne konsentis: “Ankoraŭ mankas al vi sperto de vivo kaj klasa batalo; iru poste, kiam vi estos pli aĝa.” Hiaŭmin respondis: “Prezidanto Maŭ instruas al ni: ‘La korektaj ideoj de la homo povas veni nur de socia praktiko, de la produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimento — la tri tipoj de praktiko en la socio.’ Ĝuste ĉar mankas al mi sperto de batalo, mi do des pli bezonas iri por min hardi.” La patrino diris: “Vi estas nur dekkvinjara, neniam forlasis la hejmon, kaj neniam spertis malfacilan vivon. Subite vivi en alia medio estas tro malfacile por vi!” Hiaŭmin rediris: “Prezidanto Maŭ diris: ‘La perspektivo estas brila, dum la vojo estas zigzaga.’ Liu Hulan povis oferi sian vivon por la revolucio estante 15-jara. Kiel mi povus esti timigita de iom da malfaciloj? Revoluciante oni ĝuste devas ‘spiteme iri al la monto, klare sciante ke tie troviĝas tigo.’” La vortoj de Prezidanto Maŭ havas plej altan aŭtoritatecon kaj plej grandan potencon. Unu vorto lia egalvaloras al dek mil de aliaj. Dank’ al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la patrino iom post iom konsciis sian eraron. Ŝi studis la “tri popularajn artikolojn” kun la proble-



mo, faligis siajn egoismajn konsiderojn kaj forigis la tuberon en sia penso. Fine, ŝi ĝoje iris al la lernejo por esprimi sian subtenon al la revolucia ago de Hiaŭmin.

Kiam Hiaŭmin estis baldaŭ forironta, la patrino demandis: “Kion vi bezonas kunporti?” Hiaŭmin respondis: “Sufiĉas por mi la verkoj de Prezidanto Maŭ, nenion pli mi bezonas.” Tiel, kun la trezoraj verkoj de Prezidanto Maŭ en kvar volumoj kaj ardanta koro, Hiaŭmin venis al la granda Okcidenta Vuĝumukin-stepo kune kun siaj batalamikoj.

Veninte al la stepo, ŝi ĉiutage studis verkojn de Prezidanto Maŭ seninterrompe, aplikis tuj kion ŝi lernis, konstante klopodis elimini egoismon kaj starigi kolektivismon, kaj ĉerpis senliman forton el la grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ. Ŝi juris en si: “Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ, vi estu certa ke mi neniam forgesos ke la laboranta popolo estas niaj gepatroj kaj ni estas iliaj gefiloj, kaj ke mi servos al la vastaj amasoj de paŝtistoj de la stepo kaj faros kune kun ili klasbatalon dum la tuta vivo!”

Hiaŭmin opiniis, ke por bone servi al la laboranta popolo kaj revolucii kune kun ili, oni devas observi la instruon de Prezidanto Maŭ “fari la decidon trasperti longdaŭran kaj eĉ doloran hardadon”. Ŝi

sciis bone, ke kvankam alveninte al Interna Mongolio, “ŝi jam demetis la lernejan uniformon kaj surportas veston el maldelikata ŝtofo”, tamen en la kapo ankoraŭ restas al ŝi multaj etburgaraj ideoj, kaj en ideologio ekzistas granda interspaco inter ŝi kaj la vastaj amasoj de paŝtistoj. Ŝi decidis sincere lerni de la paŝtistoj, antaŭ ĉio lerni de ilia proletara sento de klara diferencigo de amo kaj malamo kaj firma proletara starpunkto, samtempe “komenci de ĉiu bagatela afero”, kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ en la klasbatalo kaj produkta batalo, kaj akceli la revoluciigon de sia ideologio.

La vastaj amasoj de paŝtistoj plej amas Prezidanton Maŭ kaj plej malamas klasajn malamikojn. Ili rakontis al la junaj intelektuloj la historion de sia familio. Ĉiu rakonto estis sango- kaj larmoplena akuzo kontraŭ la malluma malnova socio, forta kritiko al la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj kaj prikanto al Prezidanto Maŭ, la ruĝa suno en la koroj de niaj diversnaciecaj popolanoj. Ĉio ĉi tio donis al Hiaŭmin vivecan klasan edukon.

Kiam Hiaŭmin komencis la paŝtadon de ŝafoj, ŝi pensis en si: “Ĉu tio ne estas facila? Oni devas nur peli la ŝafojn el la stalo matene kaj revenigi ilin vespere.” Tial ŝi sentis, ke ŝi ne havas multajn aferojn por fari. Sed, por la sama laboro,

la maljunaj paŝtistoj estas tre okupataj dum la tuta tago. Jen ili almetas kontraŭpedikan medikamenton al ŝafoj suferantaj, jen ili donas trinki al malfortaj ŝafidoj. Iu bofratino eĉ nutris ŝafidojn de la kolektivo per la laktpulvoro por sia bebo. Ŝi estis tre emociita de la multaj agoj, kiuj elmontris la amon de la paŝtistoj al la kolektivo. Ŝi studis la verkon *Memore al Norman Bethune* kun problemoj. En la verko Prezidanto Maŭ diras: **“La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondeca sento al la laboro...”** Ekde tiam ŝi rigardas la ŝafpaŝtadon kiel revolucion laboron donitan al ŝi de la Partio kaj la popolo kaj bonan ŝancon por sia ideologia reformado. Ŝi serioze lernas de la paŝtistoj kaj ĉiam zorgeme paŝtas la ŝafaron, tute same ĉu en vento aŭ en pluvo.

Foje, Hiaŭmin vidis malpuran robon de avo Ningpu kaj volis lavi ĝin por li. Sed, kiam ŝi ĝin levis kaj trovis ke la robo estas plena de gras- kaj kot-makuloj, ŝi ekhezitis. Tiam ĉe ŝiaj oreloj eksonis la instruo de Prezidanto Maŭ: **“Plej**

puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ili estas pli puraj ol la burĝaj kaj etburĝaj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekaĵon.” Ŝi ekpensis, ke vesto povas esti repurigita, kiel ajn malpura ĝi estas, sed la ideologio estas malfacile repurigebla, se ĝi estas malpurigita. Tiel, ŝi kun plezuro pure lavis la robon de avo Ningpu.

De tiam Hiaŭmin ĉiam pensas pri la tri demandoj en ĉiuj aferoj: Kiel Prezidanto Maŭ instruas? Kiel la malriĉaj paŝtistoj kondukas? Kiel mi agas? Ŝi klopodas konformigi siajn dirojn kaj agojn al la penso de Maŭ Zedong kaj al la interesoj, pensoj kaj sentoj de la vastaj amasoj de paŝtistoj.

Tiamaniere, ŝi ĉiam kreive studas kaj kreive aplikas la penson de Maŭ Zedong, sincere lernas de la laboranta popolo kaj iom post iom reformas sian neproletaran mondkoncepton post sia veno al la stepo de Interna Mongolio. Ŝi decidis fariĝi novtipa paŝtisto sur la stepo, kombiniĝi kun la vastaj paŝtistaj amasoj dum la tuta vivo kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong.

Fiksloĝiĝo de Intelektaj Junuloj en Montvilaĝo

GENNONG

I

Antaŭ du jaroj, en la monato majo, kiam pompis floroj sur la montoj, en Linĉang-brigado, Vanli-komunumo, Ginhian-gubernio, Liaŭning-provinco, oni bonvenigis kun tamburado kaj gongado 15 junulinojn, kiuj venis el la urbo Ljuda por fiksloĝiĝi tie. De tiu tempo, al la 19 familioj, kiuj

loĝas en la montvilaĝo, aldoniĝis la 20-a. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝoje diris: “Por ke nia amata Prezidanto Maŭ estu trankvila, ni devas bone kulturi tiujn junulojn, kiuj venis tien laŭ lia instrukcio.”

Iun matenon, falis subtila pluvo. Aŭdinte, ke iu junulino estas malsana, la malriĉkamparanino

Tria Onklino venis al ŝi en la pluvo por dekokti por ŝi la kuracherbojn. Kun tre kora danko la junulinoj sentis la varman koron de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en Tria Onklino. Post la foriro de la onklino la volontula sanitaristino Koŭ Kiaŭjun relegis la instruon de Prezidanto Maŭ: “La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo.” Ŝi decidis preni kamaradon Bethune kiel sian ekzemplon, zorgi la aliajn same kiel Tria Onklino kaj servi al la popolo por la tuta vivo.

En iu severa vintra nokto, fajfante blovis norda vento kun densaj grandaj neĝflokaj. La komunumano Lin Higia urĝeme venis al Koŭ Kiaŭjun

por peti ŝin kuraci lian knabon. Malgranda Koŭ tuj vestis sin kaj ekiris kun sia medikamenta kesto.

En la domo de Lin Higia, ŝi trovis, ke la tuta familio ĉirkaŭas maltrankvile la knabon, kiu ruliĝas pro doloro sur la masonita lito. Ŝi diagnozis, ke la doloron kaŭzas askarido, kaj tuj faris al la knabo injekton. Ŝi gardis lin ĉe la lito, ĝis kiam li iom post iom endormiĝis. Nur tiam malpeziĝis ŝia koro. La avo de la knabo kun emocio diris: “Ja estas vere bone ke ni havas vin junulinojn en nia vilaĝo!” Malgranda Koŭ diris: “Mi nur faris tion, kion Prezidanto Maŭ instruis al ni.”

II

La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj pleje aŭskultas la vortojn de Prezidanto



好儿女共赴前方



Maŭ kaj agas laŭ liaj instruoj tuj post lerno. La junulinoj diris: Ĝuste tion ni devas unue lerni de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiam ni prenas ilin kiel nian modelon. La okazaĵo ankoraŭ freŝas en la memoro de Jang Ŝuguj. Kiam ŝi komencis lerni plugon de kampo, ŝi ne povis bone direkti la bovon. La plugilo iris zigzage kaj malgranda Jang multe ŝvitis, pene tenante la plugilan tenilon. Rigardante la serpentumantajn plugsulkojn, ŝi vere perdis la kuraĝon. Rimarkinte ŝian animstaton, la maljuna estro de la laborgrupo, kiu instruis ŝin direkti plugilon, kuraĝigis ŝin: "Zigzagaj sulkoj ne kreskigos zigzagajn plantojn; unufoje mallerta, duafoje jam sperta. Daŭrigu kuraĝe!" Trovante ke malgranda Jang restas silenta sen respondo, la estro sciis, ke ŝia problemo en la pensado ankoraŭ ne estis solvita. Post momento, li demandis: "Kiun pecon el la vortoj de Prezidanto Maŭ ni kune legis hieraŭ?" Malgranda Jang tuj recitis flue el la artikolo *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*: "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon." Aŭdinte tion, la estro ekridis. "Pro kio vi ridas?" malpacience diris malgranda Jang. La estro respondis daŭre ridante: "Ne utilas sole parkeri, gravas agi laŭ ĝi." Ruĝiĝis ĉe tio malgranda Jang. Ŝi rigardis la bovon kaj la teron. "Jes agi laŭ ĝi!" Diris ŝi kaj, svingante la vipon, rekomencis la plugadon.

La junulinoj modeste lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por kreskigi ĉe si la penson kaj senton de laboranta popolo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Foje, Jang Ŝuguj ricevis la taskon sterki kampojn per fekaĵo. La tasko embarasis ŝin. Antaŭe en la urbo, kiam ŝi renkontis fekaĵĉaron, ŝi ĉiam rapidigis siajn paŝojn kaj kovris al si la nazon. Kaj nun ŝi devas preni fekaĵon per la mano. Kia naŭzo! Vidante ŝian ŝanceliĝon, iu komunumano intence demandis al ŝi: "Malgranda Jang, ĉu vi abomenas la malpuraĵon?" Ŝi pensis en si, ke fekaĵo ja estas propre malpura, sed en la buŝo ŝi diris: "Ne." "Tiam estas bone," diris la komunumano, kaj preninte plenmanon da fekaĵo, li daŭrigis ridante: "Kiel bona estas la fekaĵo! Greno kvazaŭ floro sin prezentas; plene de fekaĵo ĝi dependas." Tiu ĉi diro pensigis malgrandan Jang, kaj ŝi cerbumis, kial malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne abomenas la malpuron de fekaĵo? Prezidanto Maŭ diris, "ke la plej puraj ja eatas la laboristoj kaj kamparanoj, ili estas pli puraj ol la burĝaj kaj etburĝaj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj

manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekaĵon." Ĉe memoro de tiu instruo de Prezidanto Maŭ, subite venis al ŝi la penso: Ne la fekaĵo malpuras, sed mia burĝara ideo!

El sia sperto de la batala vivo, la junulinoj profunde sentis, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas iliaj plej bonaj instruistoj.

III

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la vilaĝo prenis la kulturadon kaj edukadon de tiuj junaj intelektuloj kiel sian naturan devon. Per rememoro kaj komparo ili komprenigis al la junulinoj la amaran de la malnova socio kaj ke la nuna feliĉa vivo estas tre malfacile akirita, por ke ili neniam forgesu sian devenon.

Venis la unua datreveno de la fiksloĝiĝo de la junulinoj en la montvilaĝo. Kiel celebri tiun tagon? La milica subplotonestro Liu Ligjuan interkonsiliĝis pri tio kun siaj batalamikoj. Ili decidis inviti la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por kune okazigi kunvenon por rememori la amaran pasintecon en komparo kun la nuna feliĉo, kaj forte kritiki la damnindajn krimigojn de la ĉina Ĥruŝĉov en restarigo de kapitalismo.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj plej bone komprenis la koron de la junulinoj. Onklino Lin, kiu multe suferis en la malnova socio kaj havas profundan malamon kontraŭ ĝi, preparis frumatene "amarrememorigan manĝon" por la junulinoj. Metinte la "kukojn" el brano kaj sovaĝa legomo sur la tablon, Onklino Lin komencis rakonti al ili siajn malfeliĉajn suferojn en la malnova socio. Ankoraŭ en la infanaĝo ŝi jam devis vivi el almozpetado. Iufoje, ŝi venis al la pordo de iu bienulo. La malaminda bienulo ne nur donis nenion, sed eĉ ellasis sian hundon por ŝin mordi. Parolante, ŝi levis sian pantalonotubon kaj montris al la junulinoj la cikatron. Ankaŭ Onklino Hju, malriĉkamparanino de la dua laborgrupo, kiu venis por partopreni la kunvenon, rakontis sian doloran travivaĵon plore.

La rakontoj plenaj de sango kaj larmoj tre tuŝis la korojn de la junulinoj. Kun larmoj ili manĝis "kukojn" el brano kaj sovaĝa legomo kaj trinkis amar-legoman supon. Ĉu la amaro devenas de la sovaĝa legomo? Ĝi devenas evidente de la malnova socio! Ankaŭ Deng Jujong, la milica vicsubplotonestro, kaj aliaj kelkaj junulinoj rememoris la mizeran historion de siaj familioj.

Plenaj de indigno, ili draste refutis la absurdajn argumentojn, kiujn la ĉina Ĥruŝĉov elmetis por restarigi kapitalismon. Ili ĉiuj esprimis, ke ili ĉiam sekvas la revolucionan vojon montritan de Prezidanto Maŭ al la intelektaj junuloj: iri al montoj kaj kamparo kaj bone daŭrigi la revolucionan aferon, por ke nia socialisma ŝtato neniam ŝanĝu sian koloron tra mil kaj mil generacioj.

Ja estis neforgesebla tago. Jam estis profunda nokto. Kuŝante sur la lito, la junulinoj longtempe ne povis endormiĝi kun nekvietigebla ondado de pensoj, precipe Zoŭ Ligjun, ĉar ŝi rememoris la okazaĵon en marto de la pasinta jaro.

Iufoje, la malriĉkampanino Onklino Vang vizitis la junulinojn. Ŝi vidis eluzitan ĵaketon sur la planko kaj forportis ĝin al sia hejmo. Post unu tago, ŝi reportis al ili la veston, jam pure lavitan kaj bone flikitan, kaj demandis: "Al kiu apartenas la vesto?" Malgranda Zoŭ rapideme respondis: "Ho, dankon, Onklino Vang! Tiun veston mi

jam delonge ne plu portis kaj forĵetis." Kun sento de malagrabeco, Onklino Vang diris post momento da pripenso: "Knabino, en la malnova socio, tian veston oni eĉ ne povis ricevi! Ni nun havas bonajn tagojn, sed ni ne devas forgesi la pasintecon!" Malgranda Zoŭ tre hontiĝis kaj klinis sian kapon. Ŝi pensis en si: Tute prava estas ŝia vorto! Onklino Vang ne nur flikis la truojn sur mia vesto, sed ankaŭ la truojn en mia penso.

En la nokto, ŝi ĉiam pli emociiĝis, kiam ŝi pensis pri la afero. Ŝiaj larmoj gutis sur la kapusenon. Sonis la vorto de Onklino Vang ĉe la oreloj de malgranda Zoŭ "Ni nepre ne forgesu nian devenon!" Kiu malriĉa familio ne havas historion plenan de sango kaj larmoj? Antaŭ la Liberiĝo, ŝia patro fariĝis knabolaboristo en fabriko de iu kapitalisto jam en la aĝo de pli ol dek jaroj. En vintro, li devas transporti feron nudpiede en neĝo pro manko de mono por aĉeti ŝuojn. Kiel eblis al li havi decan veston! Nun ni malriĉuloj fariĝis mastroj. Ni ja ne devas forgesi nian devenon, ni ja ne devas forgesi klasbatalon!

* * *

Pasis jam du jaroj depost la fiksloĝiĝo de la junulinoj en la montvilaĝo. Retrorigardante sian luktadon en la pasintaj du jaroj, ili diris kun profunda kompreno: "Oni povas enradikiĝi en la kamparo nur tiam, kiam la penso de Maŭ Zedong enradikiĝis en lia cerbo." Ili ĉiam pli varme amas la kamparon kaj decidis fari revolucion tie por la tuta vivo.





Hing Janzi en rizplantida kampo kun siaj kamaradinoj

Dek Jaroj

en la

Kamparo

HING JANZI

EN 1958, alte tenante la tri ruĝajn flagojn de la ĝenerala linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo, la popolo de nia lando grandpaŝe antaŭenmarŝis sur la larĝa vojo de socialismo kun entuziasma impeto kaj alta batalvolo. En tiu bonega situacio, mi suriris la revolucion vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj responde al la alvoko de la granda gvidanto Prezi-

danto Maŭ. Mi vivis en la kamparo jam dek plenajn jarojn ekde 1958. Dum tiuj dek jaroj mi estis hardita kaj mia politika konscio estis altigita tra la praktikado de klasbatalo kaj produkta batalo. Mi kreskas senĉese sub la nutrado de la brila penso de Maŭ Zedong. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ trifoje akceptis min, kaj tio estis por mi plej grandaj zorgo kaj kuraĝigo.

LA KAMPARO ESTAS VASTA MONDO

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Ĉiuj intelektuloj, kiuj povas labori en la kamparo, devas ĝoje iri tien. La kamparo estas vasta mondo, en kiu oni povas multon fari.” Sekvante tiun ĉi instruon de Prezidanto Maŭ, mi fikse loĝis en la kamparo.

Nelonge post mia alveno al la kamparo, okazis sinsekvaj stagnoinundoj. Profitante la ŝancon, klasaj malamikoj agitis inter junuloj por ke ili forlasu la kamparon por iri al urboj. Ili diris: “Ne longe loĝos en la kamparo Hing Janzi.” Kaj iuj bonkoraj maljunulinoj konsilis al mi: “Stulta knabino, viaj gepatroj ambaŭ vivas en urbo, tamen vi ne daŭrigis vian lernadon aŭ serĉis laboron tie, sed venis al la kamparo. Kia perspektivo prezentiĝos al vi en akvo kaj ŝlimo?” Vidante la koton sur mia korpo kaj palpante la sangvezikojn sur miaj manoj, ankaŭ mi pensis ke mi ne devis veni al la kamparo. Ĉu reveni al la urbo aŭ resti en la kamparo? Tre akra pensbatalo ekiris en mia cerbo. Mi foje-refoje studis la brilan

verkon de Prezidanto Maŭ *La Direkto de Junulara Movado* kaj profunde eksentis ke la problemo, ĉu iri persiste aŭ ne iri la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj estas por mi rigora provo kaj serioza klasbatalo. Mi decidis sekvi la grandan instruon de Prezidanto Maŭ kaj labori en la kamparo por la tuta vivo!

Sed, kiel ni venku la multajn alfrontatajn malfacilojn? Kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi ripetade lernis de la “malriĉula” spirito de Vang Guofan kaj decidis, ke ni helpu nin mem per produktado. Mi kaj kelkaj virinoj formis fiŝkaptan grupon. Iuj malestimis nin, dirante: “Ĉu virinoj povas kapti fiŝojn?” Sed, tio ne ŝancelis nian decidon. Ni ĉiutage ellitiĝis frue kaj enlitiĝis profundanokte kaj fiŝkaptadis spite al frosto. Post batalado dum la tuta vintro, ni gajnis por la brigado pli ol 3,000 juanojn, kio ne nur solvis la malfacilojn en vivo de la komunumanoj sed ankaŭ edukis tiujn, kiuj malestimis virinojn. La hardiĝo en la malfacila kaj peniga vivo forlavis la burĝaran

Janzi parolas kun junaj intelektuloj, kiuj nove venis por fiksloĝi en la kamparo. Ili kune kontraŭbatalas egoismon kaj kritikis reviziismon.



malpuraĵon el mia cerbo kaj plifortigis mian proletaran amikecon kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En la luktado kontraŭ la naturo, oni devas ne nur uzi sian korpan forton, sed ankaŭ la kapon. Ni entreprenis la plibonigadon de la grundo kaj sciencan eksperimentadon sur malaltaj alkalaj kampoj kaj ricevis riĉan rikolton. Ni plie organizis sciencan eksperimentan grupon de triflanka kombiniĝo de junuloj, veteranaj kamparanoj kaj kadroj, por propagandi progresintajn spertojn kaj disvastigi bonajn speciojn kun tre bona rezulto. En senĉesa praktikado, ni junuloj ekposedis, iom post iom multajn teknikojn kaj sciencajn konojn de agrikulturo.

Kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj vasta junularo, mi krome fosis kanalon, konstruis digon kaj kulturebligis virgan teron. Post kelkjara pena luktado, tiu ĉi Norda Granda Marĉo konata kiel neprilaborebla jam fariĝis grenejo hodiaŭ. La vastaj malriĉkamparanoj kaj malsupera mezkamparanoj diris kun ĝojo:

*Kiam ŝanĝiĝas penso, ŝanĝiĝas ankaŭ l' tero,
Novan aspekton havas la Granda Marĉo Norda,
Antaŭe akv' kuniĝis tie kun la ĉielo,
Sed nun aromas tie rizplantoj en bonordo.*

La kamparo estas ja vere granda mondo, kaj ankoraŭ pli belaj perspektivoj ridetas al ni!

HARDIĜO KAJ MATURIĜO EN KLASBATALO

La dek jaroj, kiujn mi pasigis en la kamparo, estis ankaŭ jaroj, en kiuj mi hardiĝis kaj maturiĝis en klasbatalo. La realo de klasbatalo en la kamparo donis al mi profundajn lecionojn.

Tuj kiam mi venis al la vilaĝo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rakontis al mi la historion de klasbatalo en ĝi. Ĉiuj klasbataloj okazintaj de la agrara reformo ĝis la popolkomunismo donis al mi vivan lecionon de klasa eduko. Tio profunde komprenigis al mi, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj plej bone komprenas klasojn

Knabinoj de Janzi-grupo en laboro





Hing Janzi studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun maljuna malriĉkampanino.

kaj klasbatalon kaj plej bone komprenas revolucion, estas por mi imitindaj ekzemploj.

Por plifortigi mian ideon pri klasbatalo kaj altigi mian konscion pri la batalo inter la du linioj, mi konstante petis avon rakonti al mi la pasintajn suferojn, kaj petis maljunajn malriĉkampanojn, kiuj multe suferis en la malnova socio, rakonti al mi la historiojn de siaj familioj kaj de la vilaĝo. Mi cetere transloĝiĝis en la hejmon de la malriĉkampanino Onklino Hie por lerni de ŝi. Tiu ĉi maljunulino laboris kiel servistino ĉe bienulo de sia infanaĝo, kaj poste ŝi migris kiel almozulo dum dek ok jaroj. La damninda malnova socio deprenis al ŝi la vivon de tri infanoj. Ĉiufoje kiam ŝi rakontis la suferojn, plialtiĝis al mi la klasa konscio, pli profundigis mia malamo kontraŭ la klasmalamikoj kaj pli proksimiĝis al mi la proletara sentimento de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

De kiam mi fikse loĝiĝis en la kamparo, mi tuj fariĝis pikaĵo en la okuloj kaj dorno en la karno por la klasaj malamikoj. En 1964, por subfosi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj plie disigi la vicojn de intelektaj junuloj, kiuj iris al montregionoj kaj kamparo, la ĉina Ĥruŝĉov sendis dufoje sian nigran sekvanton Ĝoŭ Jang al nia vilaĝo. La lasta plenenergie distrumpetis la burĝaran filozofion de socia vivo skribitan en la nigra *Memkulturo*, neniom tuŝante la studon de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj servon al la popolo. Li ĉiurimede instigis min strebi al famiĝo kaj specialistiĝo, vane provante logi min al malĝusta vojo de reviziismo. Sed, ilia lupe malica celado neniam sukcesis. Ĝuste en tiu jaro, kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis min, li refoje montris klare al mi la direkton por antaŭenmarŝo. Kaj mi decideme marŝas laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Sed, la klasaj malamikoj neniam volentas forperei. En la granda proletara kultura revolucio, ili denove levis diablan venton de kontraŭrevolucia ekonomiiismo, subinstigante grandnombrajn intelektajn junulojn, kiuj laboras en la kamparo, forlasi la kamparon kaj reveni al urboj. Mi do studis kune kun tiaj junuloj en nia vilaĝo la instruojn de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj, kune batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon, kaj tiel frakasis la kriman intrigon de la klasaj malamikoj. Ni ĉiuj ĵuris decideme: La kamparo ja estas nia batala posteno!

ĈIAM KUNE KUN LA AMASOJ

Ĉijare, sinsekve naskiĝis la provinca, subprovincaj kaj guberniaj revoluciaj komitatoj. Fariĝis pli peza la devo sur miaj ŝultroj kaj pli multaj la laŭdoj pri mi fare de la amasoj, post kiam mi estis de la amasoj elektita en la diversnivelajn revoluciajn komitatojn. Mi pensis, ke la laŭdoj de la amasoj estas plej grandaj konfido kaj spronado al mi. Ĝuste en tia stato, mi devas des pli modeste aŭskulti opiniojn de la amasoj, interkonsiliĝi kun ili kaj ne agi arbitre laŭ la propra bontrovo. Strikte ligiĝi kun la amasoj ne estas ordinara problemo de laborstilo, sed grava problemo, kiu decidas, ĉu mi povas aŭ ne povas esti kulturata kiel daŭriganto de la revolucia afero de la proletaro, ĉu la novnaskiĝintaj revoluciaj komitatoj povas aŭ ne povas esti firmigitaj. Prezidanto Maŭ kaj la Partio edukas min, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj fidis min kaj konfidis al

mi certan rajton, tial mi povas nur pli bone servi al la popolo kaj neniel agi kiel mandareno. Sekve, mi difinis al mi, ke mi ne devas havi ian ajn ideon pri aparteco en la penso kaj ian ajn apartan postulon en la vivo.

Post la organizo de la revolucia gvida grupo en la brigado, mi trovis ke iuj kamaradoj, kiuj faris portempe erarojn en la granda proletara kultura revolucio, havas timheziton en la penso kaj timas paroli en kunvenoj. Mi pensis, ke ili ĉiuj estas miaj klasaj fratoj, kaj ili faris portempe erarojn en la movado kiel trompitoj de la burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov, do mi havas devon helpi ilin kaj unuiĝi kun ili por kune batali por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

Tial, mi meminciate petis de ili opiniojn, studis la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kune kun ili kaj kune rememoris la pasintajn suferojn kaj la hodiaŭajn dolĉaĵojn. Tiamaniere, mi ligiĝis kun ili koro kun koro. La malriĉkampano Giaŭ Ĉanggiang diris kun emocio: “Mi estis trompita de la malamiko en la pasinteco kaj

mistraktis vin, farante al vi veran bedaŭrindaĵon.” Mi respondis: “Ni estas melonoj de la sama tigo. La ĉina Ĥruŝĉov estas nia malamiko n-ro 1-a, sur kiun ni devas koncentri ĉiujn niajn malamojn.”

Fariĝinte kadro, mi devas uzi pli da tempo por kunvenoj. Malgraŭe, mi kaptis firme ĉiujn momentojn por ke mi havu tempon labori kaj batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon kune kun la komunumanoj. Mi konkuras preni al mi la laboron plej pezan kaj prezenti min kie la plej penigaj taskoj atendas.

En la pasintaj dek jaroj, mi trairis parton de la vojo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj. Tamen la vojo antaŭ mi estas ankoraŭ tre longa. Mi nepre tenos firme la instruon de Prezidanto Maŭ en mia memoro, serioze studos kaj aplikos kreive la verkojn de Prezidanto Maŭ, senĉese altigos la konscion pri klasbatalo kaj pri la batalo inter la du linioj, disvolvos la gloran tradicion de la Partio strikte ligiĝi kun la amaso kaj por ĉiam marŝos antaŭen laŭ la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ!

Hing Janzi humile lernas de maljunaj kamparanoj pri klasbatalo kaj produkta batalo.



Plej Plej Longan Vivon al Prezidanto Maŭ!

ŜI JONGFU

*De l' lagoj kaj de l'maroj ĉiuj akvoj kaj lazuraj ondoj
Ne tiom dolĉas, kiom de Ŝaŭŝanĉong la kristala fonto.
Kaj Prezidanto Maŭ per ĝi akvumas la terenon,
Tiel ke pompas verdoj kaj skarlatoj en plenpleno.*

*Nek perlo el marfundo, nek trezor' el montinterno,
Tiom valoras, kiom pinoj sur Ginggaŝ-montaro.
Kaj Prezidanto Maŭ ja estas la plantinto de l' arbaro,
Tiel ke ĉie sur la montoj verdas pinoj en eterno.*

*Nek la plenronda luno, nek la steloj sur la ĉielfono
Tiom lumigas, kiom lamp' el la Jan-an-a kaverndomo.
Kaj Prezidanto Maŭ ja estas tiu lamptenanto,
Kiu briligas ruĝe l' koron de l' popol' tra l' tuta lando.*

*Ne tiom belas bunte ĉielarko kaj aŭroro,
Kiom standardoj antaŭ Tian-anmen-o en koloro.
Kaj portas Prezidanto Maŭ l' standardon de revolucio,
Gvidante la popolon sepcent-milionan de Ĉinio.*

*Ne ruĝas granatflor' en maj' kaj en septembr' acerfolio,
Ti-kiom la standardo de la pens' de Maŭ Zedong,
Malfermis Prezidanto Maŭ per la kultur-revolucio
Novan etapon de l' revolucio de la tuta mond'.*

*Muzikoj el diversaj lokoj ravas ĝisebrie,
Tamen plej ĉarmas la kantson' de l' popolkolektivo.
Ekkantas la kvin kontinentoj kune samarie:*

“Al Vi, ho Prezidanto Maŭ, plej longan, plej plej longan vivon!”






Varma aklamo al la publikigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio

Vicaro de Revoluciaj Inĝenieroj kaj teknikistoj en Kreskado




La teknikistoj de laborista deveno, aliaj revoluciaj junaj teknikistoj kaj revoluciaj gvidaj kadroj petas opiniojn de laboristoj antaŭ la memprojektita preciza frotuma ilmaŝino.

La Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko, kiu produktas precizajn frotumajn ilmaŝinojn, firme sekvas la vojon kulture teknikajn laborantojn el laboristoj kaj tiel alportis profundan ŝanĝon al la vicaro de teknikaj laborantoj de la fabriko. Absoluta plimulto de la laboristo-devenaj teknikaj laborantoj fariĝis spino en teknologio. En la longdaŭra laboro, ili akumulis riĉan praktikan sperton kaj estas kompare kompetentaj en teknologio. La ĉefprojektintoj de ses el la dek novaj precizaj frotumaj ilmaŝinoj sukcese provproduktitaj en la unua duono de la kuranta jaro estas teknikistoj de laborista deveno. En la granda proletara kultura revolucio, kun senlume fidela klasesento al Prezidanto Maŭ ili fervore sin ĵetis en la amasan revolucion kritikon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la ĉina Ĥruŝĉov. Ankaŭ en la produkto ili manifestis grandajn kreivan saĝon kaj teknologian talenton kaj faris novan kontribuon al la socialisma konstruado de nia lando.



Supre dekstre) La in-
geniero de laborista
Arveno Vu Delun pro-
ces nove produktitan
maŝinon.

Sube dekstre) La
laboristoj legas la en-
tutan raporton publi-
kigitan en la Popola
Jurnalo. (vidu koncer-
nan artikolon en tiu



Vang Defa (*meze*), teknikisto de laborista deveno, rakontas al la studentoj sian komprenon el la sperto de neforlaso de fizika laboro.

La vastaj revoluciaj laboristaj kaj oficistaj amasoj forte kritikas la reviziisman scienc-teknikan linion de la ĉina Ĥruŝĉov.





La Japana Popolo Korinklinas al Prezidanto Maŭ

EN Japanio aperis du propagandaj trupoj de la penso de Maŭ Zedong, kiuj ĝuas varman bonvenigon de la japana popolo. Ili ne nur mem diligente studas la penson de Maŭ Zedong, sed ankaŭ fervore propagandas ĝin al la vasta amaso. Ilia revolucia spirito estas varme laŭdata de la japana popolo.

PROPAGANDI LA PENSON DE MAŬ ZEDONG INTER AMASO DE LABORISTOJ KAJ KAMPARANOJ

En la pasinta jaro, la japana teatra trupo "Dent-rado" faris viziton en Ĉinio dum kvar monatoj. La granda proletara kultura revolucio de Ĉinio, iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ persone, multe kuraĝigis la revoluciajn literaturajn kaj artajn batalantojn de tiu trupo. Post kiam ili revenis al sia patrolando, ili organizis tri propagandajn taĉmentojn de la penso de Maŭ Zedong ekde januaro ĉijare, por propagandi la penson de Maŭ Zedong kaj la grandan proletaran kulturalan revolucion de Ĉinio. Ili entreprenis longan vojaĝon por fari propagandon kaj prezentadon al la amasoj en Tokio, Hokkaido, Osako kaj 20 gubernioj kaj urbo, inkluzive de Jamaguĉi, Ĉiba, Sendai kaj Tojama. Kaj ĉiuj prezentaĵoj estas kreitaj de ili mem. En la daŭro de malpli ol kvin monatoj la nombro de iliaj spektantoj jam atingis ĉirkaŭ 20,000.

Tiuj revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj kiuj ricevis intiman aŭdiencon ĉe Prezidanto Maŭ, jam faris firman decidon esti ĉiam liaj bonaj lernantoj. Ili portas kun si la revolucionan trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj liajn aliajn verkojn, persiste studas ilin ĉiutage kaj klopodas studi kaj apliki ilin kreive. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke literaturo kaj arto devas servi

al kaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas kombiniĝi kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili profunde iris en fabrikojn, minejojn, vilaĝojn kaj loĝkvartalojn por fari prezentadon al la amasoj kaj samtempe lerni de ili. Krome, en strikta ligo kun la bataloj de la amasoj, ili verkis novajn ludprogramerojn por stimuli la batalvolon de la amasoj.

Iufoje, kiam ili venis al iu urbo en Sanin por fari prezentadon, tie ĝuste okazis strik-batalo de laboristoj. Ili do subtenis, unuflanke, la batalon de la laboristoj per praktika agado, kaj aliflanke, en la sama punkto verkis kaj provludis mallongan teatraĵon spekulantan tiun batalon kaj prezentis ĝin al la laboristoj en la sekvinta tago. Tio ricevis varman akklamadon de la lastaj kaj multe levis ilian batalvolon. Alifoj, ili faris prezentadon por havenaj laboristoj en Osako. Kiam la artistoj prezentis la unuigon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ damnindaj koloniistoj kaj elŝiron de pafiloj el la manoj de jankioj, la laboristoj ne povis regi sian internan emociigon kaj senĉese aplaudis kaj hurais: "Bonege! Brave! "Ĝuste tion ni volas!"

Ĉien, kien venis tiuj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong, ili kunportis nombron da verkoj de Prezidanto Maŭ kaj insignoj kun lia portreto por donaci ilin al japanaj revoluciaj popoloj, kiuj varme amas Prezidanton Maŭ. Krome ili konstante okazigis kunsidojn kun la amasoj kaj fervore konigis al ili la iradon de la granda proletara kultura revolucio, kiun ili propraokule vidis en Ĉinio. Kelkfoje tia kunsido daŭris ĝis profunda punkto. Multaj estis kortuŝitaj de ilia spirito de "ekskluziva" kaj "senrezerva" servado al la popolo. Iuj diris: "Via revolucia spirito emocias nin. Via tiel bona prezentado estas rezulto de tio, ke vi armis vian cerbon per la tri popularaj



Alte tenante grandan slogan-rubandon "Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong", la revolucia popolo de Japanio manifestacias por firme konduki la batalon kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj ĝis la fino.

artikoloj' de Prezidanto Maŭ." Aliaj diris: "Via prezentado pliigis nian kuraĝon. Ankaŭ ni batalos per la armilo de la penso de Maŭ Zedong." Multaj laboristoj ekscitite kriis post spektado de ilia prezentado: "Vivu la granda penso de Maŭ Zedong!"

Parolante pri sia decidemo, iu membro de propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong diris: "Nia tuta vivo kaj ĉiu nia vorto aŭ ago devas servi al propagando de la penso de Maŭ Zedong." Nun tiuj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong daŭre batalas rompante la subfosadon kaj malhelpadon fare de usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj la reviziisma kliko de Mijamoto.

KINEMATOGRAFA TAĈMENTO VARME AMATA DE LA AMASO

En la okcidenta parto de Japanio estas kinematografia taĉmento, kiu apartenas al la Komuna Kinematografia Asocio de Jamaguĉi-gubernio kaj ĝuas varman amon de la amaso.

La nomita asocio fondiĝis en 1958. En la pasinteco ĝi aktivadis ĉefe en urboj. En aŭgusto 1966, nombro da revoluciaj kamaradoj de tiu

asocio faris ribelon kune kun la revoluciaj maldekstruloj de Jamaguĉi kontraŭ la reviziisma kliko de Mijamoto. Kun la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, ili venkis ĉiujn subpremojn kaj persekutojn faritajn de la reviziisma kliko de Mijamoto kaj usonaj kaj japanaj reakciuloj, kritikis la influojn de reviziismo, difinis al si la politikon "propagandi la penson de Maŭ Zedong kun filmo kiel armilo" kaj suriris la revolucionan vojon de tutkora servado al la japana laboranta popolo vizaĝe al la laboristoj kaj kamparanoj.

En la unuaj kelkaj monatoj, ili ofte subtaksis la politikan konscion de la amaso kaj trotaksis la forton de malamikoj, tiel ke ili ne aŭdacis profundigi inter la amasojn por disvolvi sian laboron. Tiam ili studis kun aparta atento la ĉapitrojn "Revolucia Heroismo" kaj "Kuraĝi Batali kaj Kuraĝi Venki" de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj tio sufiĉe levis ilian kuraĝon en batalo. De tiam ili komencis fari rondiran filmoprezentadon en kaj ekster Jamaguĉi-gubernio, precipe en foraj urbetoj kaj vilaĝoj, kie oni neniam rigardis ĉinajn filmojn, kaj ricevis varman bonvenigon de la amasoj.

En sia laboro, ili ofte renkontis detruojn fare

de malamikoj. Antaŭ la alveno de la kinematografa taĉmento, reviziistoj de Mijamoto-kliko en komploto kun la japana reaktia registaro disdonis kaj surgluis ĉie flugfoliojn por ataki la Jamaguĉi-ajn revoluciajn maldekstrulojn kaj kalumni la grandan proletaran kulturan revolucion de Ĉinio. Dum filmo-prezentado iliaj provokistoj venis al loko por krei malordon kaj eĉ kruele batis la projekciistojn. Tamen, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**kuraĝi batali kaj kuraĝi venki**”, la lastaj unuiĝis kun tieaj amasoj kaj faris heroan batalon kontraŭ la malamikoj, ĉiufoje puŝante ilin al hontinda fino. Foje, kiam la taĉmento projekciis en iu urbeto filmon prikantantan la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la ĉefo de Mijamoto-kliko en tiu regiono persone elpaŝis por malhelpi la amasojn spekti la prezentadon. Sed tio vekis grandan indignon ĉe la amasoj. Iu laboristo diris: “Ni ja ĝuste estimas Prezidanton Maŭ kaj amas la novan Ĉinion. Ĉiu, kiu oponas kontraŭ Ĉinio, estas malamiko de la japana popolo.” Sub la rebato de la popola amaso, fine fiaskis la subfosa intrigo de la malamiko. Post rigardo de la filmo, la spektantoj varme salutis la projekciistojn kaj esprimis sian deziron, ke la lastaj ofte venu filmoprezenti ankoraŭ en la estonteco.

La projekciistoj de la Komuna Kinematografa Asocio firme tenas en la koro la “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kaj ilin efektivas en agado. Ofte okazis ke iu malgranda unuo kun nemultaj homoj aŭ amaso de malproksima regiono petis ilin filmoprezenti. La spektantoj estas nemultaj kaj la loko malproksima, ĉu iri aŭ ne? Kiam ili memoris la instruon de Prezidanto Maŭ “**ekskluzive**” kaj “**senrezerve**” servi al la popolo, ili decidis iri. Post spektado la tieaj amasoj ĉiam kortuŝe laŭdis: La kinematografa taĉmento ja indas la nomon de revoluciaj maldekstruloj studentaj la “tri popularajn artikolojn”.

La projekciistoj de la Komuna Kinematografa Asocio ofte diras: “Ni ne estas ordinara kinematografa taĉmento. Por propagandi la penson de Maŭ Zedong, ni devas plene oferi la fortojn, kiujn ni havas.” En sia kontakto kun la amasoj, ili informiĝis, ke la amasoj urĝe bezonas la revoluciajn trezorajn librojn — verkojn de Prezidanto Maŭ. De tiam ili ĉiam portas kun si verkojn de Prezidanto Maŭ por kontentigi la bezonojn de la amasoj, kiam ili vizitas iun lokon aŭ iras filmoprezenti. Precize tiamaniere, la kinematografa taĉmento de la Komuna Kinematografa Asocio varme propagandas la penson de Maŭ Zedong.

KURANTAJ AFEROJ

PORTEBLA X-RADIA APARATO

Plene disvolvinte la kreivan saĝon de la revoluciaj laboristoj, la Gujĝou-a Kuracaparata Fabriko sukcesis provfabriki malgrandan porteblan rentgen-radian aparaton taŭgan por uzo de rondira kuractaĉmento en la kamparo. Tia aparato, pakita en kesteto kaj pezanta nur 15 kilogramojn, estas facile dorsportebla. Laŭ la ekspertizo de koncerna instituto, ĝi estas la plej laŭdata tipo inter la samspecaj produktaĵoj. La Gujĝou-a Kuracaparata Fabriko jam komencis ĝin produktadi kiel gravan produktaĵon.

LAMINATEJO KONSTRUITA EN VUHAN

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Vuhan-a Radiomateriala Fabriko mem projektis kaj konstruis per siaj propraj manoj laminatejon, kiu jam estas malfermita al produktado.

La tuta kompleto da grandtipaj ekipaĵoj instalita en tiu ĉi laborejo povas en la daŭro de dudek kelkaj sekundoj rulpremi dikan aluminian aŭ kupran ingoton en stangon kun dikeco de fingro, uzatan en produktado de elektraj fadenoj kaj kabloj.

SUKCESO EN PROV FABRIKO DE ARTEFARITA DIAMANTO

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, sub la forta subteno kaj kunlaboro de multaj fabrikoj kaj sciencexploraj unuoj de la tuta lando, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de koncernaj esploraj institutoj kaj fabrikoj de la Unua Ministerio de Meĥanika Industrio de nia lando sukcesis en provfabrikado de artefarita diamanto, rompinte la fremdlandajn rutinajn regulojn kaj sin apogante sur la propraj fortoj. Nun ĝia produktado estas jam komencita.

Artefarita diamanto estas nova produktaĵo aperinta internacie en la lastaj jaroj. Por produkti ĝin necesas altnivela teknika ekipaĵo. Ĝi posedas la saman kvaliton kiel la natura diamanto kaj estas nemalhavebla por disvolvi modernan industrion.

Bonega Estas la Fortepiana Muziko “Ruĝa Signal-lanterno” kun Kantado de

LA prezentado kaj radiodissendo de la nova speco de revoluciaj literaturo kaj arto de nia lando — fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado de pekina opero trovas varman aplaŭdon ĉe la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ĉe revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj. De urboj ĝis kamparo, de institucioj ĝis lernejoj, de vendejoj ĝis PLA-garnizonoj ĉie aŭdiĝas la laŭdo “bonega estas la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado.”

Ili montris ke la alvenigo de fortepiano sur la scenejon de pekina opero per kompare sukcesa kreo de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado donis novan vivon al fortepiano

en ĝia servo al la proletara politiko kaj malfermis novan vojon ne nur por la okcidentaj muzikiloj kaj simfonio, sed ankaŭ por la muzika akompano de la operoj de nia granda patrolando. Tiu nova triumfa kanto de la penso de Maŭ Zedong sonanta post la ok revoluciaj modelaj teatraĵoj prezentas novan grandan frukton de la granda proletara kultura revolucio de nia lando; ĝi multe kreskigis la batalvolon de la revoluciaj popoloj kaj subigis la arogantecon de la imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj, pli forte kritikis kaj peze batis la kontraŭrevolucion, reviziisman literaturan kaj artan linion efektivigatan de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj.

Revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Hinhua-presejo aklamas al la televida prezentado de fortepiana muziko Ruĝa Signal-lanterno kun kantado de pekina opero.



Pekina Opero

De multaj tagoj, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj kolektiĝas ĉe radioricevilo kaj televidiloj por aŭskulti kaj spekti la radiodissendatan prezentadon de la nomita fortepiana muziko kun kantado rekte el la teatro. Fojon post fojo, ili aŭskultas, kaj ju pli ili aŭskultas, des pli ili ŝatas ĝin kaj ĝojas pro ĝi. Multaj el ili skribis unuj post aliaj al la Centra Popola Radio por peti plilongigon de la tempo por ĝia dissendo. Ankoraŭ aliaj el ili entuziasme skribis al la *Popola Ĵurnalo* siajn impresojn pri ĝi kaj de ĝi ricevitajn instruojn kaj kuraĝigojn.

Ili emocie diris: La fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado estas granda iniciato en la granda proletara kultura revolucio; same kiel la ok revoluciaj modelaj teatraĵoj, ĝi estas senprecedence bona artaĵo. Ekstreme emociataj estis tiuj kamaradoj el la reprezentantoj ĉeestantaj la Duan Kunvenon de Reprezentantoj de Rotoj kun Kvar Bonoj de la Mararmeo, kiuj havis la feliĉon spekti la nomitan fortepianan muzikon kune kun la granda instruanto Prezidanto Maŭ en la vesperkunveno, okazigita de la Grupo de Kultura Revolucio de CK de la Partio por celebri la 47-an datrevenon de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. La brilo de la ruĝa suno prilumis la scenejon aparte hele, la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado sonoris ĝis la ĉielo. En tiu momento kaj ĉe tiu sceno, ili pli profunde komprenis ke “Marnavigo dependas de la stiristo, revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong” estas granda vero, kaj pli konkrete vidis la senkomparan potencon de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

La fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado aŭdiĝas ankaŭ sur la fronto de

Fugian. Batalantoj de la kvara roto de iu trupo defendantaj iun insulon fojon post fojo kolektiĝis ĉe radioricevilo por aŭskulti ĝin. La batalantoj laŭdis ĝin per poemo:

*Orienta vent'. Alflugas belaj kantoj,
Ĥore ekjubilas ĉiuj batalantoj.
Oper-aprezante, gardas ni la maron
Kun la ruĝa kor' por Prezidanto Maŭ.*

La fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado donas al la batalantoj grandan kuraĝigon kaj instruon. Ili decidis, same kiel la herooj Li Juhe kaj Li Tiemej, dediĉi sian tutan vivon al la revolucia afero de la proletaro.

La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en Muĉenggian-minejo de la Pekina Min-ekspluata Buroo, Huangtugang-a Popolkomunumo kaj multaj aliaj lokoj, trovis ĉe la aŭskulto de la radiodissendo de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado, same kiel ĉe tiu de la ok revoluciaj modelaj teatraĵoj, ke ĉiuj kantitaj vortoj kaj frazoj iras rekte en ilian koron kaj ripetade laŭdis, ke “ĝi estas bona artaĵo sendita de Prezidanto Maŭ al ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj”. La landa labor-modelo Jin Vejĉen — ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Huangtugang-a Popolkomunumo kaj iuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: Antaŭe iu muzika ensemblo el urbo venis al nia komunumo kun multaj okcidentaj muzikiloj, sed la komunumanoj ne povis kompreni la fremdlandajn muzikaĵojn de ili prezentatajn, kaj antaŭ ol la fino de la prezentado foriris jam plejparto de la spektantoj. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ja ne ŝatas, nek volas aŭskulti tian “altklasan muzikon”. Tute alia estas ĉifoje la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado. Ni tuj komprenas ĝin, ju pli ni aŭskultas ĝin, des pli ni ŝatas ĝin aŭskulti. La herooj Li Juhe kaj Li Tiemej kvazaŭ staras antaŭ ni kaj batalas kune kun ni, tiel ke kreskas al ni forto tra la tuta korpo. Nur sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado, kiu apartenas al ni laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, povas plene brili sur la scenejo de la socialismaj literaturo kaj arto! Ni milfoje krii laŭte: Vivu la triumfo de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ! Vivu! vivu! longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

“Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj,

kampanoj kaj soldatoj.” Kiam la vastaj amasoj de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj dum spektado rememoras tiun instruon de Prezidanto Maŭ, ili sentis apartan intimecon. Iuj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Hinhua-presejo de Pekino diris, ke aŭskultante la fortepianan muzikon *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado, ili kvazaŭ vidas la revolucion heroecon de Li Juhe, plenplena de kuraĝo antaŭ kruelaj malamikoj, kaj la sentimajn figurojn de la revoluciaj herooj Li Juhe kaj Li Tiemej, kiuj alte tenante la ruĝan signal-lanternon iras kuraĝe rekte antaŭen. Iuj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko havas eksterordinaran ĝojon pro tio ke la fortepiano suriris la scenejon de pekina opero kaj fariĝis efika instrumento por servi al la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj. Ili opinias ke kun larĝa son-amplekso kaj forta esprimivo, fortepiano povas pli bone reliefigi kaj prezenti la spiritan fizionomion

de personoj por ke la sentimento de herooj en opero montriĝu pli riĉa kaj ilia figuro pli alta.

Dum akklamado pri la venka naskiĝo de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado la vastaj amasoj de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj unuvoĉe kondamnis la ĝisĉielajn krimagojn de la nigra kontraŭrevolucia literatura kaj arta linio antaŭenpuŝita de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj.

Ili esprimis, ke ili nepre alte tenos la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj batalos, kune kun la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj, sub la gvido de kamaradino Giang King, la brava standardo-portanto de la kultura revolucio, por komplete frakasi la nigran kontraŭrevolucion, reviziisman literaturan kaj artan linion kaj lasi la proletaran revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ doni pli grandajn fruktojn!

Esti Revoluciaj Literaturaj kaj Artaj Batalantoj Ĉiam Fidelaj al Prezidanto Maŭ

JIN ĈENGZONG

LA muzikilo fortepiano, kiu servis al la burĝaro de centoj da jaroj, fine liberiĝis hodiaŭ, akiris novan vivon kaj povas servi al la proletaro, al la vastaj laboristaj, kampanaj kaj soldataj amasoj. Tio estis nia varma aspirado de multaj jaroj, kaj fine realiĝis nun sub la brilo de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

Kiam ni retrorigardas la vojon, kiun ni trairis, ni pli profunde sentas, ke la naskiĝo de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado de pekina opero estas venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, venko de la granda direktivo de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” kaj granda frukto produktita

sub diligenta kulturado de kamaradino Giang King.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: “**Kreskado de ĉiu ajn novaĵo devas trapasi malfacilojn kaj zig-zagojn.**” Kiel novaĵo, ankaŭ la kreskado de la fortepiana muziko kun kantado de revolucia moderna pekina opero iris malglate kaj spertis intensan batalon inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

Fortepiano, muzikilo nomita de la burĝaro kiel “reĝo de muziko” kaj “perlo sur la krono de muzika arto”, estas obstina citadelo inter la okcidentaj muzikiloj, kiu de centoj da jaroj ĉiam estis monopoligita de la burĝaro kaj servis al tiu klaso. La plejparto de verkoj ludataj per ĝi predikas la putran, dekadencan penson kaj sentimenton de



K-do Jin Ĉengzong, verkinto de tiu ĉi artikolo

la burĝaro. Post la Liberiĝo, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj senbride distrumpetis la penson restaŭri la antikvajn, adori la fremdajn kaj nei la ĉinajn, lasis la burĝaron daŭre okupi la pozicion de fortepiana arto, kaj plenforte reklamis la varojn kiuj estas famaj, eksterlandaj, antikvaj, feŭdismaj, burĝaraj kaj reviziismaj, por ke la fortepiano fariĝu instrumento de la ĉina Ĥruŝĉov en fabrikado de publika opinio por restaŭri kapitalismon. Ili koruptis junajn studentojn kaj muzikajn laborantojn per instigo al partopreno de internacia konkurso, al famiĝo kaj majstriĝo kiel logilo.

Dank' al la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj profundiĝo inter laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn ekŝanĝiĝis al mi la penso kaj sentimento. Mi kaj miaj kamaradoj ofte diskutis pri la demando:

“Ĉu fortepiano povas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj? Kaj kiel?” Ni pensis: “La fortepiano estas muzikilo kreita de la laboranta popolo, kial povus esti ke ĝi ne kapablas servi al la laboranta popolo, al la politiko de la proletaro kaj al socialismo?” La brila penso de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” prilumis niajn korojn. Mi kaj miaj batalamikoj faris firman decidon revoluciigi la fortepianon por ke ĝi servu vere al la proletara politiko, al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La granda venko de la revolucio en la pekina opero donis neelĉerpeblajn forton kaj kuraĝon al nia revolucio de fortepiano. Ni pensas, ke sub la gvido de kamaradino Giang King, la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong konkeris la plej obstinan citadelon — la pekinan operon, do kian alian citadelon malnovan ni ne povas konkeri? Sub la kuraĝigo de la granda venko en la revoluciigo de la pekina opero, ekde 1964, mi kaj miaj batalamikoj faris iujn provojn por servigi fortepianon al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, per rekomponado de revoluciaj kantoj de amasoj kaj de popolkantoj popularaj inter ili. Sed, eĉ tiujn malgrandajn provojn ĉiel malhelpis kaj subfosis la manpleno da kontraŭrevoluciaj reviziistoj superregantaj en la literaturaj kaj artaj rondoj. La kontraŭrevolucia reviziisto Lin Mohan diris al mi: “Ne estu tro streĉita kaj tro intensa en via nuna fortepianludo; vi devas okupiĝi pli multe pri lirikaĵoj.” La reakciaj akademiaj “aŭtoritatuloj” elsaltis unu post alia kaj tirane riproĉis min: “Ne foruzu la tempon por sensencaĵo kun ili, bone ekzercu vin super fortepiano. Se vi volas verki, vi devas unue studi harmonion, muzikan formon, polifonion, instrumentadon ktp.” Sed ĉiuj tiuj senĉesaj riproĉoj kaj blasfemoj ne povis ŝanceli la revolucion decidemon de mi kaj miaj kamaradoj. Ni firme konvinkiĝis, ke fortepiano estas nur instrumento, se ĝia ludanto nur efektive plenumas la revolucion literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, ĝi povas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj trovi ilian bonvenigon.

En januaro de 1965, alportante la intiman zorgon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj varman esperon de la proletara komandejo, nia estimata kaj amata kamaradino Giang King persone venis al nia Centra Muzika Ensemblo. Ŝi aŭskultis ludon de diversaj muzikiloj kaj atente

pridemandis ilian kvaliton. Ŝi intime kuraĝigis nin: “La armiloj estas tre bonaj, mi opinias, ke ili certe povas servi al la popolo kaj la revolucio.” Ŝi firme diris, ke ni nepre iru nian propran vojon. La serio da gravaj instrukcioj de kamaradino Giang King bruligis revolucion incendion en simfonia muziko, kaj samtempe montris senlime luman perspektivon al la okcidentaj muzikiloj. Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong kaj la rekta gvidado de kamaradino Giang King, la vasta revolucia batalantaro literatura kaj arta de nia ensemblo brave batalis kaj frakasis unun post alia la barojn, kaj la revolucia simfonia muziko *Ŝagiabang* finfine sursceniĝis je la nacia festotago de 1965. Tiu sukceso multe inspiris nin, kaj venis al mi la ideo prezenti la pekinan operon per fortepianludo. Kaj mi komencis provludi sur fortepiano.

En la bonega situacio de sinsekvaj venkoj de la granda proletara kultura revolucio, en aprilo lastjare, ni finfine aŭdis pri la instrukcio farita de kamaradino Giang King frue antaŭe en 1964, ke fortepiana muziko devas esti uzata por kantado de revolucia moderna pekina opero. Eĉ tiel gravan instrukcion la plenmano da kontraŭ-revoluciaj reviziistoj blokadis al ni du jarojn kaj duonon. La instrukcio de kamaradino Giang King klare orientis nin en nia antaŭenmarŝado kaj donis al ni grandan spiritan forton. Ni firme decidis elhaki al ni vojon de fortepiana muziko uzata por kantado de revolucia moderna pekina opero laŭ tiu instrukcio.

En majo lastjare, celebre al la 25-a datreveno de la publikigo de la brila verko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, nia ensemblo organizis propagandan trupon de la penso de Maŭ Zedong por prezentadi surstrate kaj unufoje fortepiano estis portita sur straton. Sur la vasta kaj grandioza Tian-anmen-placo, mi kaj alia kamaradino de nia ensemblo kune prezentis pecon el *Ŝagiabang* — “Avino Ŝa Riproĉas Malamikojn” por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Nia unua provo ricevis ilian bonvenigon; tio donis al ni tre grandajn kuraĝigon kaj instigon. Fariĝis pli klare al ni, ke nur sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ “**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**” kaj iri la vojon de revolucio de la pekina opero, kiel instrukciite de kamaradino Giang King, fortepiana muziko uzata por kantado de revolucia moderna pekina opero, estas la ĝusta direkto.

Ekde majo lastjare, sub la varma helpo kaj forta subteno de la revoluciaj kamaradoj de la Ĉina Pekin-opera Trupo, ni serioze studis la kantpecojn de la *Ruĝa Signal-lanterno* kaj ilian akompanan muzikon. La senkompare noblaj heroaj figuroj de Li Juhe, Li Tiemej kaj avino Li multe inspiris nin, tiel ke ni havis tre fortan deziron prezenti kaj prikanti ilin per fortepiano. Kiam ni pretigis fortepianan muzikon por kelkaj kantpecoj en la opero kaj prezentis ĝin antaŭ kamaradino Giang King, ŝi donis sian aprobon al tiu revolucia novaĵo kun granda revolucia entuziasmo de la proletaro, tiel ke ni sentis nin plenaj de energio kaj decidis persisti en la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, strikte sekvante kamaradinon Giang King. Post senĉesa praktikado dum kelkaj monatoj, ni finverkis la fortepianan muzikon por ĉiuj gravaj kantpecoj de la roloj de Li Juhe kaj Li Tiemej en majo de la kuranta jaro. Antaŭvespere de la 1-a de julio, la estimata kaj amata kamaradino Giang King kaj aliaj gvidantoj de la Grupo de Kultura Revolucio de CK de la Partio persone akceptis min, Kian Haŭliang, Liu Ĉangju kaj aliajn kamaradojn kaj kompare alte taksis la fortepianan muzikon *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado. Je la unua de julio, la brila festtago de la 47-a datreveno de la naskiĝo de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio, nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin spektis nian prezentadon kaj nin akceptis. Tio estis plej grandaj kuraĝigo kaj spronado fare de Prezidanto Maŭ kaj la proletara komandejo al ni revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj.

Retrorigardante nian batalan pasintecon dum la lastaj jaroj, ni devas diri, ke la naskiĝo kaj kreskado de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado absolute ne povis disiĝi eĉ je momento de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, de la intima zorgado kaj senlaca instruado de kamaradino Giang King.

La naskiĝo de la fortepiana muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado estas nur la unua paŝo de dekmil-lia longa marŝo en la fortepiana revolucio. La laboro estonta por ni estas ankoraŭ “tasko peza kaj vojaĝo longa”. Ni firme decidis studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, iri la revolucion vojon dum la tuta vivo kaj esti revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ.

La Unua Grandtipa Ebena Frotmaŝino en Ĉinio Konstruita de Ŝanhaja Il-maŝina Fabriko

ALTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj disvolvante la revolucian spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi paroli kaj kuraĝi agi, la revoluciaj laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj de la Ŝanhaja Il-maŝina Fabriko sukcesis konstrui la unuan grandtipan ebenan frotmaŝinon en nia lando.

Frue antaŭe, en 1954, kelkaj “specialistoj” de tiu ĉi fabriko jam kopie konstruis tian maŝinon en la daŭro de du jaroj, tute laŭ fremdlanda projekta desegnaĵo. Ĝia strukturo estis komplika, ĝia kvalito tre malbona, kaj ĝi facile perturbiĝis de tempo al tempo kaj ne povis longdaŭre funkcii. Sed la rapide disvolviĝanta industria produktado de nia lando treege bezonas tian maŝinon. Jam antaŭlonge la fabrikoj, kiuj uzas tian maŝinon, kaj laboristoj de la nomita fabriko mem postulis plibonigi la projekton de ĝia strukturo. Tamen nenia plibonigo estis farita dum preskaŭ dek jaroj, kaj sekve dum longa tempo tiu produktaĵo povis esti nur klasifikita kiel “subnorma”.


En 1966 la ŝtato decidis, ke la produktado de tia maŝino ĉesu por unu jaro, kaj ke oni prenu ĝian reordigon kiel gravan objekton por plibonigi ĝian kvaliton. Rilate al tiu decido de la ŝtato aperis du pinto-kontraŭ-pintaj opinioj en la fabriko. Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, ke **“la ĉina popolo havas bravecon kaj kapablon, kaj ĝi nepre atingos kaj superos la avangardan nivelon de la mondo en nemalproksima estonteco”**, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj firme porpledis rompi la fremdlandajn rutinajn regulojn kaj iri la propran vojon de Ĉinio. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ke **“sen enketo ne estas rajto de parolo”**, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj meminitate kontaktis kun la administra sekcio, teknika sekcio kaj produktaj laborejoj kaj organizis enketan grupon de triflanka kombiniĝo por viziti fabrikojn, kiuj uzas tian maŝinon, kaj fari enketon kaj studon ekster la propra fabriko. La grupo vaste aŭskultis la opiniojn de la laboristoj, teknikistoj kaj gvidantoj de la koncernaj fabrikoj

kaj kolektis grandan kvanton da unua-mana materialo. Reveninte al la fabriko, la grupo diskutis kun la produktaj laboristoj kaj riparistoj de sia propra fabriko. Poste ili prezentis al la gvidantaro de la fabriko tre konvinkan skribon pri la projekta tasko de la grandtipa ebena frotmaŝino M 7150 A, kun la kolektita materialo kiel apendico. Tio estis forta bato rekte sur la kapojn de tiuj burĝaraj sinjoroj “aŭtoritatuloj”. Sed tiuj “aŭtoritatuloj” ne volis cedi. Utiligante sian uzurpitan pozicion kaj povon, ili kunvokis ĉiujn “specialistojn” kaj “aŭtoritatulojn” de la fabriko al kunveno por ekzameni la projekton, kun la celo fari premon al la kamaradoj, kiuj kuraĝis revolucii.

“Vi volas fari grandajn ŝanĝojn, bone, sed faru ilin en du paŝoj: unue, malgrandajn ŝanĝojn kaj poste la grandajn, kiam venos la ŝanco.” Per tio la “aŭtoritatuloj” intencis trompi la amason.

La revolucia amaso tuj travidis ilian senhontan trompon kaj diris: “Ŝanĝi neĝisfunde signifas mankon de devseno al la uzantoj kaj al la ŝtato.” Ili decidis batali kontraŭ tiuj burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” ĝis la fino por teni la dignon de la proletaro. Post la kunveno ili tuj komencis la laboron de projektado.

Post nelonge la movado de la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio komencis arde disvolviĝi. La revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj fariĝis ankoraŭ pli kuraĝigitaj en spirito. Duobliĝis ilia labor-entuziasmo en tag-nokta batalado. La revoluciaj teknikistoj translokgis sian desegnejon en la laborejon, kiu fariĝis batalejo, en kiu ĉie estis pendigitaj projektaj desegnaĵoj. La revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj kune diskutis kaj reviziis la projektojn. Se unu ne taŭgis, oni ĝin forĵetis kaj refaris novan; oni tiel faris unufoje, dufoje, trifoje... ĝis ĉiu estis kontenta. Ĉi tie estis tute rompita la malnova regulo, ke “la specialistoj ordonas kaj la laboristoj obeas”. En la daŭro de tri monatoj ili plenumis la taskon de pro-



La laboristdevena teknikisto Vang Defa donas klarigon al la publiko pri la grandtipa ebena frotuma ilmaŝino fabrikita de nia lando.

jektado, kiun oni ne povis plenumi en pasinteco eĉ en duonjaro.

Post la Januara Revolucio en Ŝanhajo, la antaŭe subpremitaj aktiveco kaj kreemo de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de tiu ĉi fabriko estis plie disvolvigitaj. Plenaj de brava spirito ili komencis la provan fabrikadon de la grandtipa ebena frotmaŝino M 7150 A en la komenco de la kuranta jaro. Formiĝis batalgrupo de "triflanka kombiniĝo", kiu konsistis el revoluciaj laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj gvidantoj. La revoluciaj gvidantoj profundiĝis rekte en la lokon de prova fabrikado kaj la revoluciaj teknikistoj

partoprenis praktikan manipulado. Kiel ordinaj laboruloj, ili pridiskutis kaj reviziis la projektojn kaj solvis malfacilojn kune kun la laboristoj. La revoluciaj laboristoj, kiuj havas plej profundan klasan senton de la proletaro kaj plej riĉan praktikan sperton, elmetis multajn plibonigajn proponojn dum la procezo de provfabrikado por pliperfektigi la konstruon de la maŝino. Kun siaj senkomparaj saĝeco kaj inteligenteco ili solvis ankaŭ serion da malfacilaj problemoj renkontitaj en la provfabrikado, tiel ke la grandtipa ebena frotmaŝino M 7150 A fine estis sukcese fabrikita en majo de la nuna jaro.

El la Novaj Aferoj en Linŝpinejo

EKDE sia naskiĝo, la Revolucia Komitato de Tiangina Linŝpinejo tenas alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj energie kondukas la batalon kontraŭ la malamikoj kaj la revolucion amasan kritikadon. Ĝi enradikiĝis profunde inter la amasoj, gvidas ilin efektiviĝi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, kaj senĉese akiris sukcesojn kaj en revolucio kaj en produktado. Ĉirkulas en la ŝpinejo multaj kortuŝaj rakontoj pri la intima rilato inter RK (revolucia komitato) kaj la laboristoj kvazaŭ inter fiŝo kaj akvo.

LABORI KIEL MASTROJ

Post la depreno kaj ekteno de la potenco, la revoluciaj laboristoj de la ŝpinejo multe disvolvis la sintenon de mastro en laboro.

Iun tagon el la lasta tagdeko de junio, sur muro ekster la oficĉambro de RK estis algluita ĝojiga anonco, ke la tuta ŝpinejo superplenumis la ŝtatan planon por la unua duono de la jaro je sep tagoj antaŭdate. Ĝi altiris al si multajn laboristojn. Ili legis kaj diris starigante sian dikfingron: “Ho bone! la produkta indiko denove estas rompita.” Por paroli pri la produkta plano de 1968, oni devas komenci de ĝia ellaboriĝo. En la jarkomenco, kiam oni komencis planadon, la kamaradoj de RK pensis, ke la totala produktvaloro de 1968 devas esti iom malpli alta ol tiu de 1967 kaj iom pli alta ol tiu de 1966, ĉar la tasko de ĝenerala riparado de la ŝpinejo havos lokon en 1968, krome, la produktvaloro de 1967 estis la plej alta en la historio de la ŝpinejo kaj tiu de 1966 estis la dua nur post tiu de 1967. Kiam RK prezentis la proponon al la laboristoj por diskutado, ekster ĝia atendo, la projekto estis tuj rifuzita de la laboristoj, kiuj kritikis ke ĝia gvido postrestas al la nova situacio de la granda kultura revolucio, kaj ke RK vidas nur senvivajn ciferojn kaj ekipaĵojn, sed ne la iniciatemon de la vastaj laboristaj amasoj vekitan en la granda kultura revolucio. La laboristoj diris tre emocie: “En la malnova socio, ni laboris kiel brutoj por kapitalistoj, ni neniel volis uzi plene nian energion, eĉ se ni tion havis. Post la Liberiĝo, ni emancipiĝis, sed la ĉina Ĥruŝĉov konfidis

nur la burĝarajn ‘specialistojn’ kaj ‘aŭtoritatojn’ por sufoki niajn iniciatemon kaj kreemon. Nun ni starigis nian propran RK post faligo de la manpleno da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, mem direktas la produkton kaj ellaboras la planon; ni ja havas en nia korpo neelĉerpeblan energion.” Tiel, ili ellaboris produktan planon por 1968 kun totala produktvaloro je 1.64% pli alta ol tiu de 1967. Dum la unua jarduono, sub la direktado de RK la laboristoj stimulis la produkton per revolucio kaj akiris brilajn sukcesojn. Nun kun plena memfido, ili denove batalas por antaŭdate superplenumi la produktan planon de 1968!

ORDINARA LABORULO POR ĈIAM

La unua paŝo de produkto en la tuta ŝpinejo iras en la laborejo por disfendado kaj moligado de lino, kie la laboro estas peza kaj malpura, tial nomata de la laboristoj “unua batallinio de produkto”. Ĝuste en tiu ĉi laborejo, kie regas intensa okupateco, estas ofte videbla iu sperta, veterana laboristo, kiu jen intense disfendas linon, jen estas absorbita en manipulado de linmoligilo. Li aperas tie, kie la laboro estas plej peza kaj malpura. Dum laborpaŭzo, li aŭ sidas inter la laboristoj por interŝanĝi intimajn pensojn, aŭ studas kune kun ili la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, aŭ diskutas pri problemoj en la revolucio kaj produkto de la ŝpinejo. Vigla revolucia atmosfero regas la laborejon sub lia ekzemplado. Tiu veterana laboristo estas neniu alia ol Feng Gjunhiaŭ, la ĉefkomitatano de RK de la ŝpinejo.


La sanstato de Feng Gjunhiaŭ ne estas tre bona, tial la kamaradoj ofte admonas lin atenti pri necesa ripozo. Sed, li diras: “La laboro plej bone hardas homon”. Post sia fondiĝo, por plifortigi la kontakton kun la amasoj kaj akceli ideologian revoluciigon de siaj anoj, RK de la ŝpinejo starigis la sistemon de partopreno de kadroj en fizika laboro. Ĉiuj RK-anoj profundiĝas en laborejojn por labori kune kun la laboristoj kaj propagandi la penson de Maŭ Zedong. Feng Gjunhiaŭ pensis en si ke, kiel ĉefkomitatano de RK, li des pli devas doni ekzemplon en tio. Tial, dum pli ol unu jaro,

malgraŭ sia malbona sanstato kaj la okupateco en RK-a laboro, li konstante persistis en partopreno de fizika laboro. En laborejo, li akceptas labor-taskon kaj disponigas sin al la grupestro same kiel ordinara laboristo, kaj ĉiam petas forpermeson antaŭ ol foriri de la laborejo pro ia afero. La laboristoj diras: "Nia ĉefkomitatano estas vere ordinara laborulo sen ia 'altrangula' teniĝo." Tial ili ofte meminciate turnas sin al li por elverŝi sian koron aŭ interkonsiliĝi kun li por solvi renkontitajn malfacilojn; la rilato inter li kaj la amasoj estas tre intima.

MALINDA ESTAS LUKSEMO

La oficĉambro de RK de la ŝpinejo troviĝas en simpla unuetaĝa domo proksima al la laborejoj. Ĝi fariĝis jam batala komandejo de la revoluciaj ribelantoj de la ŝpinejo nelonge post la komenciĝo de la granda kultura revolucio. En la tagoj, kiam iris la akra lukto inter la du klasoj kaj du linioj, la proletaraj revoluciuloj kolektiĝis tie tagnokte kaj foje-foje studis la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. En la etapo de depreno de potenco el la manoj de la manpleno da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la ŝpinejo, la revoluciuloj studis kaj diskutis ĉi tie la politikojn kaj taktikojn de la Partio. Pro tio la laboristoj havas apartan sentimenton por tiu ĉi ĉambro. Kaj post la fondiĝo de RK, oni instalas ĉi tie ĝian oficĉambron. De tiam la laboristoj des pli rigardas ĝin kiel sian komandejon de batalo.

Iutage, kelkaj veteranaj laboristoj venis al RK pro iu afero. Sed, irinte en la ĉambron, ili trovis, ke ĝi estas tute malplena kaj neniuj troviĝas en ĝi, eĉ ne tabloj. Post pridemandado ili informiĝis ke iuj en RK trovis tiun ĉi ĉambron tro malvasta kaj translokigis la oficejon en alian vastan kaj helan ĉambron situantan pli malproksime de la laborejoj. Tamen, nelonge poste montriĝis ke pli kaj pli malofte iris tien laboristoj por konsiliĝi pri aferoj. Ĉion ĉi tion la veteranaj laboristoj kaptis per la okuloj kaj pripensis en sia koro: Ĉu RK ne iros denove la malnovan vojon de apartiĝo de la amasoj, se tiel daŭros plu la afero? Kaj iuj laboristoj publikigis dazibaŭon akre kritikantan la translokigon de la RK-oficejo. Tio tuj vekis varman disputon. Iuj diris, ke la revoluciaj ribeluloj siatempe laboris en la kaduka, malgranda ĉambro, ĉar ili tiam ankoraŭ ne venis al la potenco, sed nun kun la potenco en la manoj oni ja devas havi pli vastan oficejon. Absoluta plimulto de la membroj de RK tamen ne tiel konsideris la aferon. Post ripetada studo de la instruo de Prezidanto Maŭ "**neniam disiĝi de la amasoj eĉ je momento**", ili ekkonsciis ke translokigo de la oficejo ja estas komenciĝo de disiĝo de la amasoj en ideologio, kaj ke la dazibaŭo de laboristoj estas prava kaj montras ilian zorgemon al RK. Tiel, ili tuj skribis dazibaŭon por konfesi publike al la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la ŝpinejo la eraron de



Membro de la revolucia komitato en laborejo



La revolucio stimulas la produkton. La laboristinoj intense sin okupas super ŝpinmaŝinoj.

translokigo de la oficejo kaj esprimi sian dankon al la laboristoj pro ties zorgemo al RK. En la sekvinta tago la oficejo estis retranslokitigita en la antaŭan sidejon.

INTIMULO DE LA KLASFRATOJ

La veterana laboristo majstro Dong Ĝaŭhuj malsaniĝis kaj ripozis en sia hejmo forpermesite. En tiu ĉi tago, kiam li estis iom zorgema pri la revolucio kaj produkto de la ŝpinejo, Tang Gieĝeng, membro de RK, venis al li kun kelkaj kamaradoj. Enirinte en la domon, la kamaradoj tuj demandis majstron Dong pri lia sano kaj vivo kun sincera zorgemo. Tio tre emociis la malsanulon. Elektite en RK, maljuna Tang, same kiel aliaj RK-anoj, estas tagnokte okupita por gvidi la laboristojn bone teni la revolucion kaj stimuli la produkton, kaj la aferoj de lia propra hejmo tute ne trovis lokon en lia koro. Tamen, kiam li aŭdis pri malsaniĝo de iu ajn laboristo, li ĉiam vizitis lin persone. Kiam majstro Dong vidis maljunan Tang antaŭ si, nereteneble eksvarmis multaj pasintaĵoj en lia memoro. En la malnova socio, li estis malriĉa laboristo, kiun neniu estimis. En la aĝo de dekkelkaj jaroj, li devis jam laboregi kiel bruto en Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko por la granda kapital-

isto Song Fejking. Tie li laboris dekkelkajn horojn en ĉiu tago, tamen ne povis manĝi sate nek vesti sin varme. Kiam li malsaniĝis trolacigite, neniu donis al li ĉe trinki, kaj li devis krome timi perden de la okupo. Pro la longjara vivo simila al tiu de bruto, li malsaniĝis je maldikintesta hernio. Post la Liberiĝo, liaj vivkondiĉoj multe pliboniĝis, kaj pro ricevo de kuraca prizorgado ankaŭ lia malsano fariĝis multe pli facila por li. Kiom li estas dankema en la koro al Prezidanto Maŭ! Kiam fondiĝis RK de la ŝpinejo, li ne povis endormiĝi pro ĝojekscitiĝo kaj ankoraŭ pli kreskis al li la revolucia entuziasmo. Ĉifoje kiam li fartis malbone, la kamaradoj de RK fojon post fojo instigis lin ripozi hejme. Nun maljuna Tang kaj aliaj kamaradoj speciale venis lin vidi. Memoran-te la pasintecon en komparo kun la nuno, majstro Dong pensis en si, kiom varma kaj feliĉa estas la vivado en la nova socialisma Ĉinio. Li levis sian rigardon al la portreto de Prezidanto Maŭ sur la muro kaj diris kun emocio: "Ho maljuna Tang, la bonfaro de nia amata Prezidanto Maŭ al ni laborista klaso estas nefindirebla, ni devas nepre sekvi Prezidanton Maŭ revolucii de generacio al generacio!"

Fosilioj de Gigantsimiaj Dentoj

Unuafoje Trovitaj en Hubej

EN la bonega situacio de la granda proletara kultura revolucio, junaj revoluciaj sciencaj laborantoj de nia lando unuafoje trovis en Hubej-provinco fosiliojn de dentoj de gigantaj simioj (*gigant opithecus*), kiuj estas altvaloraj por studo pri la evoluo de la homo. Tiu ĉi grava eltrovo estas nova frukto akirita de niaj revoluciaj sciencaj laborantoj kune kun la vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj de Hubej en sciencaj laboroj farataj laŭ la brila dialektika materiisma penso de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Giganta simio estas speco de antikva simio kun kolosa staturto, kiu vivis en la frua plistocena epoko antaŭ miljon jaroj. La gigantsimiaj fosilioj havas gravan signifon por studi kaj esplori la evoluon de la primatoj inkluzive de la homo kaj akiri ĝustan komprenon pri la teorio de la granda instruanto de la proletaro Engels, ke laboro kreis la homaron. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, en

Guanghi oni trovis fosiliojn de tri sufiĉe bone konservitaj mandibloj kaj pli ol mil dentoj de gigantaj simioj kaj aliajn materialojn. Kaj en la kuranta jaro, niaj junaj revoluciaj sciencaj laborantoj trovis unuafoje en la okcidenta parto de Hubej-provinco fosiliojn de pli ol 200 dentoj de gigantaj simioj. Tio montras, ke gigantaj simioj, primatoj kun kolosa staturto, vivis en la frua plistocena epoko ne nur en suda Ĉinio, sed ankaŭ en la centra regiono de nia lando. Tiu ĉi eltrovo multe vastigis la viv-arenon de gigantaj simioj en nia lando kaj frakasis la arbitran aserton ĉiam insistatan de en- kaj ekster-landaj burĝaraj "aŭtoritatoj", ke gigantaj simioj povis vivi nur en suda Ĉinio.

Ĉifoje oni trovis en la okcidenta parto de Hubej, krom la fosilioj de gigantsimiaj dentoj, ankaŭ grandan kvanton da fosilioj de faŭno de egpando-stegodono (*ailuropoda-stegodon fauna*).

KURANTAJ AFEROJ

BONA SITUACIO DE PRODUKTADO EN HANGĜOŬ

Sub la direktado de serio da plej novaj instrukcioj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la situacio de revolucio kaj produkto de la industria fronto en Hangĝoŭ estas senprecedence bona.

Ekde la kuranta jaro, venas unu post alia kuraĝigaj triumfaj informoj; kontinue kreskas de unu monato al alia la totala industria produktvaloro de Hangĝoŭ. Sur la bazo de venko ambaŭ en revolucio kaj produkto en la unuaj du monatoj de la kuranta jaro, la totala industria produktvaloro de la urbo forte kreskis en marto per 44% kompare kun tiu en februaro. Tiu en aprilo kaj majo denove havis rimarkindan kreskon, kaj tiu en junio

estis je 7.4% pli alta ol tiu en majo. Ĉiunonate kreskis la produkta kvanto de elektro, ŝtalo, ĥemia sterko, insektmortigilo, elektronaj tuboj, kotonaj ŝtofoj, silko, maŝinfabrikita papero, sapo, kaŭĉukaj ŝuoj k. a. produktaĵoj bezonataj en la konstruo de la lando kaj en la popola ĉiutaga vivo.

Ekde la kuranta jaro, sur la industria fronto de la urbo estis sukcese provfabrikitaj pli ol cent specoj de novaj produktaĵoj inkluzive la novtipan precizan ebenan frotuman ilmaŝinon kun monda progresinta nivelo, mantraktoron, oksigenujon el plasto fortigita per vitraj fibroj k. a. Disvolvante la revolucian spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Hangĝoŭ-a Ilmaŝina Fabriko denove sukcesis en provfabriko de alia modelo de novtipa preciza frotuma ilmaŝino kun monda progresinta nivelo post la supremenciita ebena frotuma ilmaŝino, kaj per tio levis la industrian produktadon al nova nivelo.



Kuraca grupo de la Ŝanhaja Huaŝan-a Hospitalo helpas en kamparo kulturaj sanitaristojn por produkta brigado. Antaŭ ĉio ili studas la "tri popularajn artikolojn" kune kun la sanitaristoj, por ke ili starigu la vidpunkton tute kaj tutanime servi al la popolo.

Produktado de Medikamentoj Bezonataj de la Kamparo

HIANGNONG

FIRME plenumante la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ "metu la gravitan punkton de la medicina kaj sanitara laboro en la kamparon", la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria fronto de medikamento en Ŝanhajo grandakvante plimultigis dum la lastaj du jaroj novajn specojn de medikamentoj uzataj por preventi kaj kuraci la ofte kaj ripetade suferatajn malsanojn en la kamparo kaj grandmezure reduktis la produktan koston de tiuj medikamentoj.

Gravan disvolviĝon spertis la medikamenta industrio de Ŝanhajo nur en la tempo de granda antaŭensalto. Antaŭ la Liberiĝo ĝi troviĝis en ekstrema postrestinteco. Tiam oni nur repakis la eksterlandajn medikamentojn en malgrandajn kvantojn aŭ simple ŝanĝis la pakon kaj produktmarkon, kaj ili povis produkti nur tre ordinarajn medikamentojn kiaj kolirio, likvaĵon kontraŭ sunfrapo, pilolon kontraŭ febro kaj doloro, ktp. Responde la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto



Sanitara grupo "26 Junio" de la Hospitalo de Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio zorgas pri la bonstato de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj iras kuraci iliajn malsanojn en montvilaĝo, kie la vivkondiĉoj estas ne tiom bonaj. Jen okulisto faras operacion por kamparanido suferanta katarakton.

Maŭ dum la granda antaŭensalto, la revoluciaj laboristaj kaj oficistaj amasoj, apogante sin sur la propra forto, sukcesis disvolvi la medikamentan industrion en sistemon kun produktkapablo de relative kompleta specaro kaj pli malpli alta nivelo. Sed tre akra estis la batalo inter la du vojoj en la medikamenta industrio de Ŝanhajo, kaj la batalo fokusiĝis en la du fundamentaj problemoj: al kiuj servu la medikamenta industrio, kaj sur kiujn oni sin apogu por disvolvi ĝin? La ĉina Ĥruŝĉov, liaj agentoj en Ŝanhajo kaj la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la Ŝanhaja Medikament-produkta Kompanio energie efektivigis en kompleto la kontraŭrevolucionan reviziisman linion. Ili plenforte praktikis la funkciigon de fabrikoj per "specialistoj". Ili

amasigis homojn kaj materialojn por provfari la t. n. "pintajn" medikamentojn en fermita kabine-to, rampante malantaŭ la kapitalismaj landoj kaj tute ignoris la medikamentojn bezonatajn por preventi kaj kuraci la oftajn kaj ripetemajn malsanojn suferatajn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la kamparo kaj de la vasta laboranta popolo, tiamaniere rekte kontraŭstarante la instruon kaj revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

Dum la granda proletara kultura revolucio, precipe post kiam la proletaraj revoluciuloj venkis en la batalo por transpreni regpotencon en la Januara Revolucio, la vastaj revoluciaj laboristaj kaj oficistaj amasoj de la medikamenta industrio de Ŝanhajo, kun la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kiel batalilo, disvolvis profundan kaj daŭran revolucionan amasan kritikon en la tuta medikamenta industrio, inkluzive de la laborgrupoj aŭ laborsekcioj de ĉiuj fabrikoj, por akre kritiki kaj kontraŭbatali plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝarajn reakciajn akademiajn "aŭtoritatulojn", kiujn la unuaj favoris kaj ŝirmis, kaj tiel plene frakasis la reviziisman linion praktikatan de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj ŝanhajaj agentoj en la medikamenta industrio. Samtempe, ili sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ kaj rapide ekagis por efektivigi la grandan taskon turni la medikamentan industrion vizaĝe al la kamparo.

La proletaraj revoluciuloj kaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de multaj fabrikoj agis laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ sendi por enketi kaj pristudi en la vilaĝoj kaj montregionoj, kaj tiel faris la unuan paŝon por turni la medikamentan industrion vizaĝe al la kamparo. Oni iris ne nur al la dek gubernioj de Ŝanhajo sed ankaŭ al Ningbo, Hangĝoŭ, Giahing kaj Huĝoŭ de Ĝegiang-provinco, Ĝengiang de Giansu-provinco, Zaŭjang de Hubej-provinco, Kimen de Anhuj-provinco kaj aliaj lokoj. Ili persone vizitis la centrajn hospitalojn de gubernioj kaj komunumajn hospitalojn kaj ankaŭ produktgrupojn, malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por enketi, kiujn medikamentojn la kamparo plej bezonas. Kie ili venis, tie ili propagandis la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ rilate al la medicina kaj sanitara laboro. Iuj fabrikoj cetere kunsendis novefabrikatajn medikamentojn kontraŭ ripetemaj malsanoj en la kamparo. Kiam ili vidis, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun la profunda klasa sento de la proletaro emocie esprimis sian dankon al Pre-

zidanto Maŭ pro lia zorgemo al ili kaj kore deziris al li senfine longan vivon, ili pli bone komprenis la grandan koron de Prezidanto Maŭ, kiu zorgas pri la popolamaso ĝis ĉiuj detaloj, kaj la saĝecon kaj grandecon de lia revolucia linio. Ili decidis nepre igis la medikamentan industrion pli bone servi al la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj laboranta popolo vizaĝe al la kamparo.

Agante laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la industria fronto de medikamento en Ŝanhajo klopodis ĉiurimede por fabriki novajn medikamentojn bezonatajn de la kamparo. Dum la lastaj du jaroj ili sukcesis fabriki 116 novajn medikamentojn, el kiuj la plejparto estas uzata por preventi kaj kuraci la ripetemajn kaj oftajn malsanojn en la kamparo, kiaj astmo, tuso, parazitaj malsanoj, stomakaj malsanoj, veneniĝo de insektmortigilo, ktp.

Dum la provado de fabrikado ili kuraĝigis kaj stimulis sin per la instruo de Prezidanto Maŭ “**servi al la popolo tutkore kaj tutanime**”, kaj plibonigis ĉiam pli la kvaliton de la produktaĵoj por ke la medikamentoj fariĝu malkaraj, altefikaj kaj facile uzeblaj. Kiam ili trovis, ke estas malfacile por kamparanoj fari injekton kontraŭ astmo, ili fabrikis kontraŭastman medikamenton en formoj de buŝe prenebla likvaĵo k. a. kiuj estas malmultkostaj kaj facile uzeblaj.

Multaj medikamentaj fabrikoj akre kritikis la reakcian vidpunkton, kiun tenis antaŭe la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la reakciaj akademias “aŭtoritatuloj” malestimi la ĉinajn tradiciajn medikamentojn. Ili lernis de vilaĝaj kuracistoj kaj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kolektis receptojn de ĉinaj tradiciaj medikamentoj kun bona efiko kontraŭ kamparaj malsanoj, por prepari pretajn medi-

Revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Gujjang-a Medicina Instituto kulturis sanitaristojn en la kamparo por popola komunumo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: “Eduko devas servi al la proletara politiko kaj kombiniĝi kun produkta laboro.”



kamentojn, iuokaze kombinitajn kun drogoj de la okcidenta farmacio. Tio estas la nova startpunkto de la ŝanhaja medikamenta industrio por disvolvi novan medikamentaron. La eniro de askarido en koledokon estas ofta malsano en la kamparo. Tio kaŭzas netolereblan doloron al la malsanulo, kaj kutime necesas ĉiokaze fari operacion. Iu medikamenta fabriko informiĝis, ke en la kamparo estas uzata ĉina tradicia medikamento por peli askaridon el koledoko sen operacio, kaj tuj sendis personojn al la kampara hospitalo por lerni la kurac-metodon. El dekmiloj da malsan-registroj akumulitaj dum pli ol dek jaroj, ili kolektis la notojn pri tiu kazo kaj atenteme studis la efikon de tiu medikamento. Kiam estis konstatite ke granda kvanto da faktoj donitaj pruvas ĝian evidentan efikon, la fabriko ekuzis ĝin por prepari facile preneblan medikamenton en formo de siropo.

Dum la provado por prepari novajn medikamentojn, la revoluciaj laborantoj taskitaj pri eksperimento kaj esploro en multaj medikamentaj fabrikoj eliris el siaj laboratorioj por iri al la kamparo kaj fabrikoj, aŭ venis al laborejoj por provadi en fabrikado kune kun la laboristoj. Ili tute frakasis la malnovan pensstilon de la burĝaraj reakciaj akademias "aŭtoritatuloj" ĉasi konkure famon kaj profiton kaj sekretigi inter si la teknikon, kaj aktive starigas la novan stilon de komunisma kunlaboro. Inter malsamaj fabrikoj, inter fabrikoj kaj sciencaj institutoj aŭ lernejoj kaj inter fabrikoj kaj hospitaloj estas interŝanĝataj materialoj kaj helpoj. Ili kunlaboras por plirapidigi la eksperimentadon de novaj medikamentoj kaj plibonigi ilian kurac-efikon.

Redukti per ĉiuj rimedoj la produktan koston de medikamentoj kontraŭ oftaj kaj ripetemaj malsanoj estis karakterizaĵo de la klopodo teni la revolucion kaj stimuli la produkton de la industria fronto de medikamento en Ŝanhajo dum la lastaj du jaroj. En tiuj du jaroj, la produkta kosto de 141 drogoj kaj medikamentoj en la tuta urbo reduktiĝis meznombro je 17 procentoj. Interalie la produkta kosto de la medikamento (*griseofulvino*) speciale efika por kuraci kap-skabion en la kamparo estis plurfoje reduktita, kaj nun ĝia produkta kosto egalas nur duonon de tiu en 1965. Ankaŭ la produkta kosto de klorokino kaj primara aminokinolino kontraŭ malario grandmezure reduktiĝis. La nuna produkta kosto de la drogo uzata por prepari la novan medikamenton "846" kontraŭ bilharziozo, kiun senpage liveras la ŝtato, egalas nur kvaronon de ĝia produkta kosto en 1965.



Albanaj junulinoj estas sturmantoj sur la fronto de agrikultura produktado. Jen Krisjavi Kokolli, kiu partoprenas produktan laboron en sia hejmvilaĝo depost sia diplomiĝo en agrikultura mezlernejo, 1966. Pro ŝia progresema penso kaj elstara laboro, la amaso elektis ŝin kiel estrinon de la Agrikultura Produkta Kooperativo de Frashtan.

LA agrikultura kooperativo Gradishte de Elban-regiono situas en la centra parto de Albanio. Tie kuŝis marĉejo kun areo de 25 hektaroj, kiu estis ĉirkaŭata de montoj, ĉiam akvoza dum la tuta jaro kaj oportuna ejo por generado de moskitoj kaj kreskado de herbaĉoj. Oni nomis ĝin Fetora Akvejo.

Inter la maljunuloj loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo de la Fetora Akvejo cirkulas jena legendo: Antaŭ multaj multaj jaroj, bovo forkuris de iu bovpaŝtisteto pro lia neglekto, sin direktis rekte en la kavernon apud la Fetora Akvejo, sed ne eliris. La kompatinda paŝtisteto kuris post ĝi en la kavernon, kaj ankaŭ li ne revenis el ĝi. La patro de la knabo brule maltrankviliĝis kaj tuj kuris en la

Batalo por Konkeri la Naturon

kavernon por serĉi sian fileton, sed ankaŭ tiu trafis la saman sorton de la knabo. Kaj tiu antikva legendo estis utiligita de la eklezio por fari trompan predikon, tiel ke la Fetora Akvejo estis vualita per mistera koloro, la kaverna monto estis nomita Diabla Monto, kaj oni ne aŭdacis eĉ movi ŝtonojn kaj teron sur ĝi.

En novembro de 1966, ĉe la Kvina Kongreso de Reprezentantoj de la Albana Partio de Laboro la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha faris gravan raporton en kiu li elmetis batalan alvokon al la albana popolo kaj ĝia junularo por ŝanĝi la naturon: "La nunaj mizeraj montoj kaj sterilaj terpecoj de nia lando fariĝos en nemalproksima estonto riĉaj montoj kaj fekundaj parceloj. Beligo de la tero dependas de la homoj kaj transformo de la montoj dependas de la manoj kaj saĝo de la homoj." Tiu granda alvoko antaŭenpuŝis la revoluciigan movadon potence disvolviĝantan tra la tuta lando al nova fluso. Ekboldis la lando de montaglo.

La membroj de la agrikultura kooperativo Gradishte kaj ĝiaj junuloj faris varman diskutadon. Iu junulo proponis firmvole: "Kamaradoj, drensekigi la Fetoran Akvejon per niaj manoj kaj ĝin ŝanĝi en fekundajn kampojn — jen la plej bona praktika ago por respondi la alvokon de la Partio!" Lia parolo rikoltis varman manklakadon de la tuta ĉeestantaro kaj la junuloj unuanime decidis transformi la Fetoran Akvejon por bela rikolto!

Ili estis entute sepo, kiu planis fosi kanaleton ĉe la piedo de la Diabla Monto por forkonduki la akvon en la Fetora Akvejo al la dorsflanko de la monteto.

La junuloj bone sciis, ke ili certe renkontos diversajn malfacilojn kaj repuŝojn por venki la Diablan Monton, sed pli multe ili pensis pri tio, kiel havigi 25 hektarojn da tero kaj produkti pli multe da greno por la patrio. Rememorante la alvokon de kamarado Hoxha ĉe la Kvina Kongreso de Reprezentantoj de la Partio, ili plifirmigis sian fidon pri venko. En iu mateno de decembro, ŝultroportante instrumentojn kaj kun plena memfido, la 7 sentimaj batalantoj ekmarŝis al la Fetora Akvejo.

Komenciĝis la laboro. Unue ili faris fosajon 2 metrojn profundan, kaj poste ili komencis fosi drenkanaleton kondukantan al la meza parto de la monteto. La fosajo havis nur malvastan spacon, kiu ebligis al nur unu homo labori kun klinita trunko. Junulo Kamber ensaltis ĝin la unua. Duonhoron poste, li elrampis spireganta kun pala vizaĝo.

"Kio okazis al vi?" demandis maltrankvilege la kamaradoj.

"Ankaŭ mi ne scias, kial mi sentis sufokiĝon nur post momenta restado sube kaj ĉiam emis vomo." La aliaj ses batalkamaradoj rigardis lin kun zorgemo.

Tiam Quemal descendis. Pasis ĉ. 20 minutoj, kaj ankaŭ li elrampis simile al Kamber, spiregante kun pala vizaĝo. La kamaradoj subtenis lin sub la brako kaj irigis lin al roko por ripozo.

La sep personoj kolektiĝis por pripensi, kiel tio okazis? La kaŭzo estis: Sub la tero abunde akumuligis karbondioksida gaso pro longa korodiĝo de la rokoj, tial tiuj en la foso sentis kapturiniĝon post iom longa laboro. Sed oni povas refreŝiĝi, nur se oni surteriĝas, prenas freŝan aeron kaj iom ripozas. Sed tiam mankis al la junuloj sperto kaj ili ne sciis tion.

Kion fari? Ĉu ĉesigi la laboron nur pro la neatendita malfacilo? La junuloj rememoris la scenon de la kunveno de la filio de la Ligo de Laborantaj Junuloj en la lasta nokto kaj la superstiĉa legendo pri la Fetora Akvejo denove eksonis ĉe la oreloj. Ili pensis: Se oni lasos la ellaboritan planon neplenumita, tio do signifos submetiĝon al feŭda superstiĉo kaj al la rutinaj fortoj, kaj signifos, ke la Fetora Akvejo estas nevenkebla. Ne! Nenia malfacilo estas nevenkebla por la albanaj junuloj, edukitaj de la Albana Partio de Laboro kaj havantaj gloran revolucian tradicion!

Kaj tuj poste Petrit saltis en la fosajon renkonte al malfacilo tute sen ŝanceliĝo. Kaj la sepo tiel daŭrigis sian laboron kun firma decido. Ili laboris laŭvice po duonhoro. La drenkanaletto rapide etendis sin pli ol du metrojn al la meza parto de la Diabla Monto.

Pasis pli ol unu monato, fariĝis pli malvarme kaj frosta vento penetra ĝis la ostoj plimalfaciligis ilian laboron. Sed same kiel antaŭe, ili iris al laboro frue kaj revenis malfrue, en- kaj el-rampadis la mallarĝan malhelan fosajon kaj elportadis teron kaj ŝtonojn en unuanima kunlaboro, kun gaja babilo kaj rido. La drenkanaletto plilongiĝis de pli ol 50 ĝis pli ol 100 metroj.

La heroaĵo de la junuloj kortuŝis la amason en la tuta vilaĝo, kaj vidante ke la legenda Diabla Monto estas iom post iom konkerata, la maljunuloj influitaj de feŭda superstiĉo komencis laŭdi la junulojn nereteneble. Stimulate de ilia ekzemplo, ankaŭ aliaj junuloj de la kooperativo organiziĝis kaj ekfosis kanaleton inter la Fetora Akvejo kaj la drenkanaleton por forkonduki la akvon.

Pasis ankoraŭ unu monato kaj la drenkanaleton fariĝis 200 metrojn longa. Iutage, dum fosado, subite defalis grandega ŝtono, kaj tiam oni aŭdis flustron de fluo. Troviĝis, ke subtera rivero fluas tra tiu loko. Tio alportis neatenditan ĝojon al la junuloj, ĉar la akvo en la Fetora Akvejo jam povos forflui, se oni nur interligos la drenkanaleton kun la subtera rivero.

Dume, ankaŭ la kanaleton de la Fetora Akvejo ĝis la drenkanaleton jam estis finfosita. Kaj la stagna akvo en la Fetora Akvejo do komencis milde flui en la drenkanaleton. La junuloj kantadis kaj saltadis de ĝojego kaj rigardadis la 25 hektarojn da fekunda nigra tero kiu finfine ekvidis sunlumon. ... Ho, kiel ĝojplena horo! La Fe-

tora Akvejo finfine estis konkerita!

En la aŭtuno de 1967, tiu terpeco liveris al la patrio la unuan kvanton da greno, la kooperativanoj rikoltis 100 tunojn da maizo en la pasinta Fetora Akvejo.

Disvastiĝis la heroaĵoj pri la transformo de la Fetora Akvejo fare de la junuloj de Gradishte. Arda tajdo levigis ĉe la junularo de la tuta Albanio por vaste ekspluati virgan teron kaj pliprodukti grenon. Varme respondante al la alvoko de la Partio, dekmiloj da junaj labor-volontuloj iris profunde en malproksimajn mont-regionojn por kultivi virgan teron kune kun la kooperativanoj kaj sin hardadi, kaj aperis pli kaj pli multe da antaŭirantaj kolektivoj kaj modeloj. Kaj laborante, oni kantas kun heroa sento:

*Pioĉ' en unu mano, pafilo en l' alia,
Heroe ni laboras por la konstru' patria.
La akvoj sin fortiru de la vojlinio,
Dezertaj montoj iĝu jam grenej-serio.
Ni kantu pri l' gvidant' amata Enver Hoxha,
Pri nia glora, firma Laboro-Partio.*

Albanaj gejunuloj intense laboras en konstruejo de la fervojo Rrogozhine-Fieri.



ĜOJIGA INFORMO

Pri la fortepiana muziko "Ruĝa Signal-lan-terno" ni aperigis artikolojn sinsekve en la 10-a kaj 11-a numeroj de nia gazeto. Por ke niaj legantoj povu pli bone kaj mem aprezi tiun ĉi literaturan kaj artan verkon novtipan de la proletaro, ni sondiskigis du el ĝiaj ĉefaj kantoj, kaj la sondiskon ni donacos al niaj legantoj inkluzive de la novaj abonantoj de la jaro 1969.

— La Red.



Sudvjetnamia Partizana Taĉmento

Plena de Sagaco

“ĈI TIE ESTAS MINOJ”

La malamiko sendis unu roton el la ĉefaj trupoj de la pupa armeo por fari “balaadon” en iu batalvilaĝo de la distrikto K. en la provinco Quang Ngai.

Sed, ĵus atinginte la randon de la batalvilaĝo, la malamikoj jam renkontis baratakon de partizana taĉmento, kaj pli ol 30 pupaj soldatoj estis mortigitaj aŭ vunditaj. Kiam la malamikoj eniris la vilaĝon, ili ne trovis eĉ spurojn de la partizana taĉmento. La vojoj kaj vojetoj estis ĉie tranĉitaj per bambuaj plektaĵoj.

La pupaj soldatoj, kiuj palpe iris antaŭe, subite vidis kelkajn tabuletojn starantajn sur la vojo kun la notoj: “Ĉi tie estas minoj, ne proksimiĝu!” “Ĉi tie estas enfalfoŝaĵoj kontraŭ usonaj imperiistoj, la pupaj soldatoj ne aliru!”

Tiuj pupaj soldatoj devis halti kaj raportis tion al la pupa leŭtenanto. Tiu tuj kriaĉis:

“Kio? Tio estas nur minaco de Vjet Kong-oj.

Ĉu Vjet Kong-oj estas tiel malsaĝaj, ke ili eĉ signas al ni siajn enfalfoŝaĵojn kaj minojn? Tuj forigu tiujn tabuletojn, rapidu!” Tiam, tri pupaj soldatoj timeme aliris por eltiri la tabuletojn, sed eksplodis la enterigitaj minoj, kaj la tri pupaj soldatoj estis faligitaj teren plenaj de sango. Inter ili la grave vundita insultis la leŭtenanton inkluzive liajn pravojn, tiel ke la lasta incitite tuj pafmortigis la soldaton per pistolo.

Aŭdinte la eksplodojn de la minoj, la postirantaj pupaj soldatoj terurigiĝis panike, tiel ke en la malordiĝo du aliaj falis en foŝaĵojn kun pikaĵoj.


Dume, iu tiranema usona “konsilisto” de la roto falis ankaŭ en enfalfoŝaĵon aranĝitan de la partizana taĉmento, tuj kiam li ŝteliste eniris la vilaĝon.

Iom poste, kiam la pupaj soldatoj aŭdis neniujn pafojn de partizanoj, ili maltrankvile rekolektiĝis por daŭrigi sian antaŭeniron palpe, pafante sencele al la domoj apud la vojo. Nun neniu el ili kuraĝis traŭri la lokojn kun tabuletoj. Sed la partizanoj ĉie starigis tabuletojn, iujn vere kun kaj aliajn trompe sen minoj, kontraŭ kiuj la malamikoj ne sciis kiel agi. La pupaj soldatoj tre timis kaj fariĝis ege nervozaj, ne sciante, kio subite trafos ilin.

VESPOJ

Vidante tion, alia usona “konsilisto” forte koleriĝis kaj ordonis la pupan leŭtenanton peli la pupajn soldatojn traserĉi la domojn. Laŭ la ordono de la mastro, la pupa leŭtenanto urĝigis siajn soldatojn al serĉado.

La pupaj soldatoj kolektiĝis antaŭ iu domo kun



fermita pordo. Ili piedbatis la pordon kaj samtempe pafis por forpeli sian timemon. En tiu tempo, tuta nesto da vespoj alflugis kaj furioze pikis la pupajn soldatojn, kiuj laŭte vekriis pro la pikado. Ankaŭ la pupa leŭtenanto estis ĉirkaŭatakata de vespoj. Trovante la situacion ne bona, li haste ensaltis lageton por eskapi de pikado, sed la vespoj ne lasis lin kvieti kaj pikadis lin, ĉiufoje kiam li ŝovis sian kapon el la akvo por spiri, tiel ke ankaŭ li laŭte vekriadis. Dume la vespoj ne preterlasis la usonan "konsiliston" kaj persekutis lin tre fervore, ke la lasta preskaŭ perdis sian spiron. Li kuris kriante kaj pafis por forpeli la vespojn, sed ju pli li pafis, la vespoj des pli furioze lin pikis. Trovante nenian alian rimedon, li eksidis kaj ŝirmis sin per dika tolo, sed la vespoj ankoraŭ flugadis ĉirkaŭ li zumante.

Profitante la ŝancon, ke la malamikoj estis embarasitaj kaj dispelitaj de la vespoj, la partizanoj pafadis kontraŭ la malamikojn tra fendoj de bariloj, tiel ke la malamikoj denove suferis pezan perdon. La restantaj malamikoj haste retirigis, postlasinte multajn kadavrojn kaj pafilojn. La partizana taĉmento jam antaŭe kalkulis ilian retirigan vojon, tial, kiam ili eniris la vilaĝon, la partizanoj jam rapide faris en konvenaj lokoj multajn enfalfojaĵojn kaj enterigis minojn. Kaj forkurante, la malamikoj efektive trafis aŭ minojn aŭ fosaĵojn kun pikiloj, kun rezulto de denove peza perdo.

STANDARDO SUPER SPORTA PLACO

La situacio de la malamiko estis tre serioza kaj embarasa. Tiam la pupa leŭtenanto ordonis al siaj restantaj homoj halti kaj kolektiĝi sur la sporta placo de lernejo en apudeco por atendi helpon de helikopteroj. Subite, la pupa leŭtenanto vidis standardon de la Naciliberiga Fronto flirtanta sur masto trans la placo. Li kolere ordonis al pupaj soldatoj forigi ĝin. Kiam kelkaj el ili aliris por tion fari, tuj eksplodis la mino enterigita sub la masto. Multaj pupaj soldatoj estis mortigitaj aŭ vunditaj, ankaŭ la leŭtenanto mortis pro la eksplodo.

Post nelonge, unu helikoptero malrapide alteriĝis sur la placo. La usona "konsilisto" kaj la restantaj pupaj soldatoj ĝin suriris konkure. Postrestis ankoraŭ multaj vunditoj, kiam la helikoptero ekflugis. Sed, kiam ĝi flugis ekster la vilaĝon, ĝi tuj renkontis la koncentritajn pafojn de partizanoj kaj ekbrulis pro ricevataj pafoj. Tamen, ĝi ankoraŭ provis daŭrigi sian eskapon sed falis en la maron, kiam ĝi flugis super ĝi. Ĉiuj malamikoj sur la helikoptero pereis.

KURANTAJ AFEROJ

PENTRARTAJ KURSOJ POR LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ

Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ pri servigo de la literaturo kaj arto al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la Ĝegiang-a Belarta Instituto de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj, komence de la pasinta novembro, fondis sinsekve en kaj ekster sia instituto plurajn pentrartajn kursojn por lernigi laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn pri pentrado, kaj aro post aro da kursanoj jam finis la lernadon. Kun senkompare profunda proletara amo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, tiuj lernantoj pentris grandan nombron da kolosaj portretoj de Prezidanto Maŭ kaj propagandaj afiŝoj pri grandaj venkoj de la granda proletara kultura revolucio.

La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la nomita instituto serioze kaj ripetade studis la brilan instruon de Prezidanto Maŭ: **"Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj."** Unuflanke, ili profundiĝis en fabrikojn, popolajn komunumojn kaj trupojn kaj pentris tie portretojn de Prezidanto Maŭ por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj aliflanke, laŭ la postuloj de vastaj revoluciaj amasoj fondis kvar pentrartajn kursojn por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj unun post alia en sia instituto kaj sur Ĝouŝan-insularo ekde la pasinta novembro. En la kursoj lernis komandantoj kaj batalantoj de PLA, revoluciaj laboristoj kaj popolkomunumanoj, kaj ankaŭ proletaraj revoluciuloj el provincaj kaj urbaj institucioj.

La fondo de tiaj kursoj fare de la belarta instituto ĝuas varman aplaudon inter la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La proletaraj revoluciuloj kaj komandantoj kaj batalantoj de PLA en Hangĝou, Giahing, Ningbo, Ĝouŝan k. a. starigis la portretojn de Prezidanto Maŭ kun vigla spirito kaj radiantia mieno pentritajn de la lernantoj en siaj lokoj kaj unuoj respektive, por ke la vastaj revoluciaj amasoj povu vidi la brilan figuron de Prezidanto Maŭ. Multaj laboristoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: "Ĉiutage ni vidas la portreton de Prezidanto Maŭ tiel ke ni estas eksterordinare energioplennaj en revolucio kaj produkto, kvazaŭ Prezidanto Maŭ estus ĉe ni."

Belaj Vortoj Ne Povas Plenigi Stomakon

ĜUSTE kiam regas severa manko de greno en multaj lokoj de Hindio kaj akra malsato minacas milionojn da hindaj kamparanoj, la estrino de la hinda reacia registaro Indira Gandhi kaj similaj vaste fanfaronas, kune kun la propagandaj maŝinoj de ili kontrolataj, pri “riĉega rikolto” de Hindio. Ili blufas, ke “en tri jaroj ne necesos plu eksterlanda helpo rilate al greno”, kaj ke “greno ne estos plu importata post du aŭ tri jaroj”. Estas vere, ke tiuj fanfaronistoj jam atingis la kulminon de senhonteco.

Lenin montris, ke subpremante la popolon, ĉiuj registaroj burĝaraj kaj bienularaj uzas ankaŭ alian metodon krom perforto, kaj “tio estas trompoj, flatado, belaj paroloj, sennombraj promesoj, malgrandaj bonfaroj, cedo en bagatelaĵo por insisti en gravaj punktoj, ktp.”

La hindaj reakciuloj jam kutimiĝis al tiu ĉi artikulo. Por daŭre teni sian reakcian regadon, ili ĉiam praktikas kontraŭ la vasta hinda popolo la du kontraŭrevoluciajn rimedojn de sanga subpremo kaj politika trompo. En fanfaronado kaj mensogado ili havas plej grandan lertecon. En 1956, Nehru, la patro de Indira Gandhi, jam garantiis frapante sian bruston, ke post kvin jaroj Hindio “ne nur provizos sin sufiĉe per greno enlande, sed ankaŭ eksportos pli multe da greno”. La rezulto estis, ke post kvin jaroj pli da greno estis ne eksportita sed importita. En 1961, la estroj de la Hinda Nacia Kongreso denove fanfaronis, ke post kvin jaroj la jara produktokvanto de greno plialtiĝos ĝis 100,000,000 tunoj. Sed en 1966, la produktokvanto ne nur ne plialtiĝis, sed, male, malplialtiĝis, kaj ĝi estis eĉ pli malalta ol tiu antaŭ kvin jaroj. En tia maniero la hindaj reakciuloj senhonte faris belajn parolojn por mildigi la malkontentecon de la vastaj amasoj. Fanfaroni, bankroti, denove fanfaroni, denove bankroti — tio

jam fariĝis regulo de agado por la hindaj reakciuloj rilate al la demando de greno dum la lastaj dek jaroj. Ĉar lastatempe komencis disvastiĝi malsatego en multaj regionoj de Hindio, Indira Gandhi ree ekpraktikis tiun malnovan rimedon por trompi la hindan popolon.

Sed, kiel ajn belaj estas la senenhavaj vortoj, ili ne povas plenigi la stomakon de la vasta malsatanta popolo. El sia propra travivaĵo, la hinda popolo jam akiris la sperton, ke la hindaj reakciuloj ĉiam fanfaronas, kaj ili ĉiam malsatas, kaj ju pli bombaste la hindaj reakciuloj fanfaronas, des pli malvaste ili devas ligi sian zonan. La hinda popolo ĉiam pli klare komprenas, ke ili povos plibonigi sian vivon, nur kiam la krima regado de la grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj estos faligita. Hodiaŭ en Hindio la batalo de la revoluciaj popolamasoj kontraŭ malsato kaj por ekzistado leviĝadas jen tie jen aliloke. La fanfaronado kaj mensogo de Indira Gandhi kaj similaj povas nur pli indignigi la hindan popolon kaj pli stimuli ilian batalon.

Malsataj virinoj kaj infanoj de loka tribo en Bihar, Hindio, atendas senpagan donon de kompatinde malgranda porcio.





La Ĉina Popolo Varme Amas la Popolan Liberigan Armeon

— Al franca amiko A.C.

Kara amiko,

Ni ricevis vian leteron, en kiu vi skribis ke vi estas tre kortuŝita de la artikoloj “La Heroa Plotonestro Li Vengong”, “Men He, Bona Kadro de Prezidanto Maŭ” kaj aliaj, kaj ke vi tre envias al la ĉina popolo, ke ĝi havas la Popolan Liberigan Armeon (PLA), kiu tutanime kaj tutkore servas al la popolo.

Jes, la ĉina popolo efektive fieras pro tiu tre revolucia kaj tre proletareca armeo. En nia lando, ĉiu homo, viro aŭ virino, juna aŭ maljuna, havas senkompare intiman kaj senkompare estiman senton por la Ĉina Popola Liberiga Armeo tuj ĉe ekmeneco de ĝia nomo. Ĉar ĈPLA estas revolucia armeo de nova tipo fondita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de Vicprezidanto Lin. Ekde sia fondiĝo tiu armeo jam firme sinapogas sur la popolo, tutkore kaj tutanime servas al ĝi kaj faris por ĝi tre meritajn servojn. La ĉina popolo profunde komprenas kaj sentas ke estas granda vero la instruo de Prezidanto Maŭ “**Sen popola armeo la popolo havas nenion**”. Pro tio la ĉina popolo ĉiam protektas tiun armeon kiel siajn proprajn okulojn. Je Printempa Festo de ĉiu jaro, ĉiuj lokoj de la tuta lando vaste disvolvas aktivadon de subteno al la armeo, kaj samtempe la armeo disvolvas aktivadon de amo al la popolo.

En tiu ĉi granda proletara kultura revolucio, aktive respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, ĈPLA refoje faris grandmeritajn servojn en la laboroj de subteno al agrikulturo, industrio

kaj maldekstruloj kaj de militaj kontrolo kaj trejnado, starigis novan batalamikecon inter si kaj la vastaj amasoj, kaj tial estas pli varme amata kaj subtenata de la popolo. En tiu ĉi letero ni rakontos al vi okazaĵon, kiu montras la varman amon de la popolamaso al PLA.

La afero okazis ĉe la piedo de Ginggang-montaro, en kiu Prezidanto Maŭ siatempe fondis la popolan armeon. La 16-an de majo de la kuranta jaro, la tiea Hongki-komunumo estis subite atakata de forta ŝtormo kun pluvego. La domo enloĝata de malgranda taĉmento de PLA, kiu estis alsendita por subteni la maldekstrulojn en tiu komunumo, estis faligita de la ŝtormo, kaj la PLA-anoj estis ĉiuj alpremitaj al la tero sub la ruino. La informo pri la akcidento okazinta al kamaradoj PLA-anoj tuj disvastiĝis ĉiudirekten. Aŭdinte tion, la gefiloj de Ginggang-montaro tuj rapidis al la loko de la akcidento, spite al la furioza vento kaj pluvego.

Ankaŭ la gvidantoj de la revoluciaj komitatoj de Ginggang-montara Subprovinco kaj de najbaraj gubernioj kaj urboj venis tuj al la loko por gvidi la urĝan savadon. Por ne vundi la karulojn, oni ne uzis pioĉojn sed mane fosadis, demetis, forportis plenforte la rubojn, tegolojn, brikojn kaj trabojn. Iliaj manoj kaj piedoj estis sange kaj dolore skrapataj, tranĉataj, pikataj de akraĵoj, rompitaĵoj kaj najloj, sed neniution atentis. La PLA-anoj unu post alia estis rapide elfositaj kaj senditaj en hospitalon.

La ordinare sufiĉe kvieta Ginggang-montara Hospitalo subite falis

en streĉan okupatecon. En plej alta rapideco, la kuracaj laborantoj de la tuta hospitalo pretigis ĉion necesan por savi la vunditojn. La jam hejmen revenintaj kuracistoj kaj flegistinoj alrapidis returnen en la pluvo memvole. Ankaŭ kuracistoj kaj flegistinoj de aliaj kuracaj unuoj alvenis por helpi. Sennombraj homoj venis al la hospitalo por iel fari sian kontribuon en la savado de la karuloj. Junaj ruĝaj gvardianoj kun larmoj ĉirkaŭis kuracistojn kaj flegistinojn kaj kore demandis: “Onkloj, onkloj, ĉu ankoraŭ estas io farenda? Tasku ĝin al mi!”

La tempo signifis vivon. La streĉaj operacioj komenciĝis. Koncentrinte sian tutan atenton, kuracistoj laboris sub operaciaj lampoj.

Dekoj da horoj pasis, oni ankoraŭ persistadis en sia laboro por savi la vunditojn.

En profunda punkto, iuj laboristoj, kamparanoj kaj junaj ruĝaj gvardianoj ankoraŭ restis garde ĉe la litoj de la karuloj. Se malvarmiĝis la manoj kaj piedoj al la karuloj, ili varmigis ilin per sia korpo, kaj malpeze kovris ilin per siaj vestoj. Ili konkure trinkigis supon kaj medikamenton al la vunditoj gluton post gluto.

La vunditoj bezonis transfuzon pro tro granda perdo de sango. Ne sufiĉis la rezervita sango en la hospitalo. Informiĝinte pri tio, homamasoj tajde torentis al la hospitalo. Aŭdiĝis laŭtaj krioj: “Ni volas kontribui sangon! Ni volas kontribui sangon!” Antaŭ la laboratorio, ĉiuj homoj kun larmoj insiste etendis al kuracistoj sian nudigitan brakon, petante ekzameni ilian sangon por transfuzi al la vunditoj. Iu

Letero de V. (Rumanio)

Mi amas la ĉinan popolon, pro tio miaj amikoj nomas min "La Ĉinano". Mi legis ĉiujn librojn pri Ĉinio, kiujn mi trovis. Mi ankaŭ legis verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong, la Granda Gvidanto de la ĉina popolo, el jaroj 1930-1950. Mi volus legi ankaŭ aliajn verkojn pri la politiko de Ĉinio, pri la granda teorio kaj penso de kamarado Maŭ Zedong.

Mi ĝojas ke sub la saĝa gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la brava kaj laborema ĉina popolo, alte tenante la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj persistante ĉe la ĝusta linio de marksism-leninismo, fidele sekvas la revolucion vojon de sinapogo sur la propraj fortoj, daŭre disvolvas socialisman agrokulturon kiel la fundamenton

de la nacia ekonomio kaj socialisman industrion kiel gvidantan faktoron, firme kaj senŝanceliĝe batalas kontraŭ la burĝaj star- kaj vid-punktoj kaj ideoj en la ideologia kampo, disvolvas la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasbatalo, la batalo por produkto kaj scienca eksperimento, kaj atingis brilajn sukcesojn.

Interesis min la vivo de ĉina popolo, kaj mi abonis vian gazeton "EL POPOLA ĈINIO".

Letero de M. B. (Albanio)

Via monata gazeto "El Popola Ĉinio" estas tre bona. Mi legis ĝin kun multa plezuro. El gazeto "El Popola Ĉinio" mi ekkonis mallonge vian landon, vian grandan proletaran kulturan revolucion kaj la batalon de la ĉina popolo por socialismo.

Mi multe kontentas ke vi aperigas ĉiam la portretojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj liajn vortojn pri ĉio.

Por senĉese plibonigi vian laboron kaj fari vian gazeton pli leginda, mi opinias ke vi devas aperigi kelkajn kritikojn pri libroj kaj arto.

Letero de P. T. (Francio)

Ni estas feliĉaj legi, profunde kaj zorge studi la parolojn de Maŭ Zedong. Ĉar vi demandas al ni niajn opiniojn kaj proponojn, mi petas vin, tute amikece, kiel eble plej laŭmezure doni al ni multe pli da informoj kaj klarigoj pri la nunaj ĉinaj okazaĵoj.

Ni portas por Ĉinio grandan korinklinon, kaj ni sekvas tre atente, preskaŭ per pligrandiga lenso, la grandan komunistan sperton, kiu okazas en via lando.

laboristo, kies sangon kuracisto rifuzis pro lia ne tre fortika korpo, senĉese petis la kuraciston almenaŭ eltiri de li kelkajn kubajn centimetrojn por ke li povu esprimi sian koron. Pli ol 20 junaj laboristoj simple "ordonis" al la kuracistoj: "Por savi la PLA-anojn, eltiru nian sangon!" Ankaŭ la kuracistoj estis ĝislarne emociitaj. Tiamaniere, la sango de la gefiloj de Gینگgang-montaro estis senĉese transfuzita en la korpojn de PLA-anoj.

En la sama tempo, ankoraŭ multaj aliaj sin okupis por tiu komuna klopodo. En tondrado kaj pluvego, laboristoj de la elektrejo riparigis la difektitajn elektrajn liniojn por garantii elektroliveron al la hospitalo. Ŝoforoj veturigis siajn aŭtojn sur kota montŝoseo por porti oksigenon al la hospitalo. La medikamenta kompanio havis konstantajn deĵorantojn por tuj liveri medikamentojn eventuale bezonatajn de la vunditaj

PLA-anoj. Por savi la karulojn, la gefiloj de Gینگgang-montaro pretis fari ĉion! Dank' al ilia komuna klopodado, ĉiuj vunditaj PLA-anoj estis savitaj.

Kara amiko, el la supre dirita okazaĵo vi povas vidi, kiel varme la ĉina popolo amas sian armeon. Ni finas la leteron ĉi tie kaj esperas ke vi ofte skribos al ni pri nia gazeto.

La Red. de EPĈ

Narciso Savis Ruĝarmeanon

TIO okazis en iama bazloko de la Ruĝa Armeo. Ĉe la bordo de rivero apud iu vilaĝeto naĝis kaduka boato. En tiu boato loĝis 15-jara knabino nomata Narciso. Narciso estis saĝa kaj diligenta kaj ofte portis homojn trans la riveron remante sian kadukan boaton, kaj oni ŝin tre ŝatis. Ŝiaj gepatroj mortis jam antaŭlonge, kaj de sia infaneco ŝi loĝis sur la boato kune kun sia avo kaj transportis irantojn sur la rivero.

Narciso kaj ŝia avo plej ŝatis prami ruĝarmeanojn. Ĉiufoje, kiam ruĝarmeanoj devis transiri la riveron por ataki la malamikon, ŝi kaj ŝia avo ĉiam ĝoje kaj rapide ilin transportis per la boato, ĉu en tago aŭ nokto, ĉu en ventego aŭ pluvego. Ili kaj la ruĝarmeanoj intime rilatis kvazaŭ samfamilianoj. Poste, la Ruĝa Armeo foriris por fari batalon aliloke. Alvenis kuomintanga bandita armeo tuj post ĝia formarsi. Atinginte la vilaĝon, la banditoj tuj komencis buĉadon, incendiigon kaj pri-rabadon. Aŭdinte, ke la avo de Narciso ofte transportis ruĝarmeanojn, la kuomintangaj banditoj lin kaptis kaj pafmortigis. Perdinte sian avon, Narciso do vivis en soleco. Ŝi sopiradis la Ruĝan Armeon tage kaj nokte kun deziro, ke ĝi baldaŭ revenu por ataki kaj ekstermi la ulaĉojn.

Iutage, la boato de Narciso kuŝis ĉe rivera bordo. Subite aŭdiĝis du pafoj en malproksimo. Narciso ek-miris kaj pensis: “Pro kio pafbruoj? Ĉu kuomintangaj banditoj denove mortigas homojn?” Kiam ŝi ekvolis surbordiĝi por pririgardi, subite iu alkuris flugrapide. Kiu tiu estas? Ŝi atente rigardis. Tiu estis neniu alia ol Malgranda Li, kuriero en la Ruĝa Armeo. Apenaŭ Narciso ekvolis lin voki en la boaton, ŝi vidis, ke li kuris supren laŭ la rivero al alia etendaĵo de altaj akvoherboj kaj baldaŭ sin kaŝis en ĝin. Narciso pensis: “Kion fari, se la malamikoj alvenos kaj traserĉos?” Sagaca ideo subite venis al ŝi en la kapon ĉe la kriza momento. Ŝi rapide remis la boaton al la alia bordo. Baldaŭ post ŝia albordiĝo la persekutanta kuomintanga banditaro jam alvenis. Atinginte la bordon, ili komencis traserĉi la herbaron kun blasfemoj. Narciso ekploregis laŭte tretadante la boaton. Tiam la malamikoj ekri-markis, ke boato kuŝas en akva herbaro. Ili ekkriis kun minaco kaj insultoj: “Tuj alremu! Alie, pafmortigon al vi!”

Kun ŝajnigita timo Narciso rapide remis la boaton al la transa bordo. Apenaŭ la boato ektuŝis la bordon, la malamikoj tuj demandis kun insulto: “Hej, pro kio vi kriaĉas? Ĉu vi ĵus vidis iun pasanton?” Sin

ŝajnigante ploranta, Narciso diris: “Antaŭnelonge iu iranto diris al mi, ke li devas transiri la riveron pro urĝa afero. Li diris, ke li multe pagos al mi, se mi rapide lin transportos; sed atinginte la alian bordon li ne nur ne pagis, sed eĉ batis min, kiam mi postulis de li pagon!” Aŭdinte, ke iu transiris la riveron, unu el la malamikoj tuj demandis: “Ĉu tiu en nigra vesto?” Iu alia saltis sur la boaton kaj diris montrante Narcison per la pafilo: “Tiom da babilaĵoj? Kial ne tuj pramu!”

Kun ŝajnigita timtremo, Narciso diris: “Rapide enboatiĝu, kaj mi tuj veturigos.” La kuomintangaj banditoj saltis en la boaton unu post alia. Ne granda ja estis la boato, kaj ĝi balanciĝis ricevinte la dekelkajn veturantojn. La boato ekmoviĝis. Kiam ĝi proksimiĝis al rivermezo, Narciso enŝovis legomtranĉilon en junton de la boatfundo nerimarkite de la malamikoj kaj forte ektordis ĝin tiel, ke en la kaduka tabulo aperis truego. Akvo tuj brue invadis la boaton. Tiam Narciso ekkriegis kun ŝajnigita konfuziĝo: “Ho ve, helpon! La boato truiĝis!” “Kio? Truiĝis la boato!” ege konfuziĝis la malamikoj. La moviĝo de la homoj sur la boato plifortigis ĝian balancadon kaj plirapidigis la enflon de akvo. Baldaŭ la holdo jam pleniĝis je akvo. “Iru al diablo! Kiel cia boataĉo povus nin transporti!” Tiam la boato estis ĝuste en torento kaj skuiĝis pli terure. Konfuza moviĝo de la malamikoj flanken klinis la boaton kaj ĝi renversiĝis. La malamikoj sur la boato ĉiuj falis plaŭde en la fluon kaj kriadis por helpo. Tie la rivero estis tre profunda, kaj baldaŭ ili surfundiĝis unuj post aliaj.

Narciso scipovis naĝi de sia infanaĝo. Ŝi naĝis subakve por momento, elakviĝis kaj ekenaĝis al la renversiĝinta boato. Kian ĝojon ŝi sentis en la koro! Ĉion okazintan klare vidis Malgranda Li, la kuriero de la Ruĝa Armeo, sin kaŝanta en la herbejo. Li tuj plonĝis plaŭde en la fluon kaj helpis Narcison puŝi la boaton al la bordo.

“Narciso, vere rimedoplana vi estas! Multajn dankojn pro via helpo.” diris la ruĝarnea kuriero.

“Neniom menciinde!” diris Narciso kun rideto. “Mi faris nur kion mi devis.”

Pli poste, la Ruĝa Armeo revenis, ekstermis la kuomintangajn banditojn kaj helpis Narcison rebonigi la boaton. De tiam, Narciso denove komencis prami homojn per sia boato sur la rivero.

Sur la kovrilo:

Nerompebla Batala Amikeco inter la Ĉina kaj Albana Popoloj

Eternas la revolucia amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj forĝita en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

En 1967, delegacio de la ruĝaj gvardianoj de nia lando vizitis la brilegan lampon de socialismo en Eŭropo kaj la landon de agloj — heroan Albanion. Jen estas membro de nia delegacio kune kun junulino kiu laboras por socialisma Albanio.

Sur la dorskovrilo:

La dezerta Zongmaŭgang de Jugiang-gubernio, Gianghi-provinco, nun jam prezentas belan bildon.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 11 (124) 1968

Ĉefa Enhavo

Enketa Raporto pri la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko

En la Mezlernejo Jan-an

Malnova Lerneja Sistema de Ĉinio

Laŭ la Vojo de Kombiniĝo kun Laboristoj kaj Kamparanoj

Nova Paŝtisto el Pekino

Fiksloĝiĝo de Intelektaj Junuloj en Montvilaĝo

Dek Jaroj en la Kamparo

Plej Plej Longan Vivon al Prezidanto Maŭ!

La Japana Popolo Korinklinas al Prezidanto Maŭ

Bonega Estas la Fortepiana Muziko "Ruĝa Signal-lanterno"

kun Kantado de Pekina Opero

Esti Revoluciaj Literaturaj kaj Artaj Batalantoj Ĉiam Fidelaj

al Prezidanto Maŭ

La Unua Grandtipa Ebena Frotmaŝino en Ĉinio Konstruita de Ŝanhaja Il-maŝina Fabriko

El la Novaj Aferoj en Linŝpinejo

Produktado de Medikamentoj Bezonataj de la Kamparo

Albanaj Junuloj en Batalo por Konkeri la Naturon

Ĝojiga Informo

Sudvjetnamia Partizana Taĉmento Plena de Sagaco

Belaj Vortoj Ne Povas Plenigi Stomakon



La kvin junaj geintelektuloj, kiuj fiksloĝiĝis en Dugiaŝan: Caj Ligian (*meze*), Vang Gang (*staranta maldekstre*), Vang Ĝen (*staranta dekstre*), Vang Gjunjing (*dekstre*), Sun Hiven (*maldekstre*).

Fiksloĝiĝi en la Kamparo Kiel Kamparanoj



aj Ligian (*dekstre*) kaj aliaj kamaradoj esploras la lokon kune kun la kadroj de la produkta grupo por fari konstruan planon.

Prezidanto Maŭ nin instruas: “**Kion oni prenu kiel kriterion por juĝi, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Per kio oni lin distingu? La ununura distingilo estas, ĉu li volas aŭ ne volas kaj praktikas aŭ ne praktikas kombiniĝon kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj.**” Por firme iri la vojon de kombiniĝo kun la kamparanoj, Caj Ligian, lernantino de la Mezlernejo por Gefiloj de Fervojaj Laboristoj kaj Oficistoj de Ĉanghindian, Pekino, kaj kvar el ŝiaj samlernejanoj venis unu post alia al Dugiaŝan de Huangcaj-komunumo, Juci-gubernio, Ŝanhi-provinco, por fiksloĝiĝi tie.



Caj Ligian (dekstre) studas la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kune kun la estro de la produkta grupo Jan Jinzi ĉe kamprando.



La vekto uzata de Caj Ligian en laboro, sur kiu estas la surskribo "ĉiam porti pezan ŝarĝon por revolucio", estas donaco de ŝiaj samlernejanoj.

